

3^a JARO.

OCEANO

N^o 10

TRA LA MONDO.

·TUTMONDA·ILUSTRATA·REVUO·ESPERANTISTA·

APRILIO
1908.



ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

ARTISTA KAJ LITERATURA VIVADO: Edmondo de Amicis kaj G. Carducci, de P^{ro} *Buquet* (FRANCUJO).

ĈIULANDAJ KUTIMOJ: La norvega edziniĝa krono, de Rev. *J. Beveridge* (SKOTLANDO). — La Blarneja Ŝtono, de *Dillig* (IRLANDO). — La danco de l' gefianĉiĝo, de *J. Flourens* (FRANCUJO).

FELIETONO: La fratoj de Mowgli, el « la libro de la ĵunglo », de *Rudyard Kipling*, tradukita de *C. W. Oxenford* (ANGLUJO).

TEATRO: Kaprico, de *Alfred de Musset*, tradukita de *J. Flourens* (FRANCUJO).

ĈIULANDA LITERATURO: El « Afrikaj leteroj », de *H. Sienkiewicz*, tradukita de *S^{ino} Hulanicka* (POLUJO).

NUNTEMPAĴOJ: La elektadaj tumultoj en Lisbono, de *E. Ĉefeč* (GERMANUJO).

PRI ESPERANTO: Kroniko, Bibliografio, de *Steleto*.



Jara abono: 8 fr. (3,20 Sm.) ĉiulande — Duona: 4.50 fr. (1,80 Sm.)
La abonoj komencas en Januaro. Aprilo, Julio, Oktobro.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Internaciaj RESPOND-KUPONOJ estas akceptataj kiel 25 cent (10 Sd.).

CAROLINE
1907. OXFORD, EN.

« Tra la Mondo » aperas REGULE KAJ AKURATE monatfine krom en Aŭgusto.


ATENTU, Sinjorino

vi ekdikiĝas, kaj dikiĝi estas maljunigi. Prenu do ĉiutage du drageojn da **THYROIDINE BOUTY**, kaj via talio restos aŭ reigos svelta.

La flakono da 50 drageoj estas sendata aŭ franko de la: **Laboratoire, 1, Rue de Châteaudun, Paris**, kontraŭ poŝtmandato de **10 fr.** Kuracado sendanĝera kaj nepre efika.

Oni zorgu precizi: **THYROIDINE BOUTY.**

ASP KANDELLANTERNOJ por Biciklistoj



Malgranda, Malpeza,
Opportuna, Pura,
Neestingebla
en Ventego.
Funkciadas bonege
nur kiam oni uzas
la por ĝi

Konstruitajn ASP-Kandelojn

145.000 Lanternoj jam venditaj!

Kostas: 4 danajn kronojn, = Spes. 2,20

kun lenso 5 kronojn, = » 2,75

18 Kandeloj kostas 1 1/2 kronojn = » 0,83

SENDOTA ĈIEN DE


O. F. ASP, Kopenhague.
DANUJO.

ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.

Generala Agento:

Sro G. RUTTER, 30, Red
Lion Squar, LONDON.



VIVO DE JESUO

de ERNEST RENAN

laŭ la 78^a milo franca tradukis

EMILIO GASSE

Mendebila ĉe ĉiuj librovendistoj, ĉe Emilo Gasse, 77, r. Ernest Renan, Havro, Francujo, kaj ĉe liaj korespondantoj:

British Esperantist, Germana Esperantisto, Ruslanda Esperantisto, Esperantisten, kaj Sro Karl Jost, Fröhlichstr., 40, Zürich (Svisujo).

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Ĉiuj korespondantoj, mendoj, k. a. devas esti senditaj nur al nia administracio por eviti erarojn aŭ prokrastojn. Oni ankaŭ abonon aŭ reabonon senpere pro la sama motivo.

Adreso: **Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O.), France.**

Urgaj sciigoj: **REKLAMOJ, ANONCOJ**, k. a. devas alveni antaŭ la 10^a de ĉiu monato, por la tuj elironta N^o.

POR ESPERANTO  POR ESPERANTISTOJ

Vera Vino Campanja

PETU

LA

ORA MARKO.

Originala Produktejo de
FORTIN PÈRE & FILS en EPERNAY (France).

SENPAGAN TARIFON

Fervojoj de Paris-Lyon-Méditerranée.

Internacia Ekspozicio de Elektraj aplikoj en Marseille (Aprilo-Oktobro 1908).

La K^{to}, por ebligi la veturon tre malkaran al Marseille, de la stacidomoj de sia relreto, liveras al la vojaĝantoj, kiuj deziras viziti la ekspozicion, la jenajn veturajn facilecojn:

- I. Individuaj ir- kaj reiraj biletoj validaj 10 tag. (dیمانĉoj kaj festoj neenhavataj) kun 33 % da rabato.
- II. Familiaj ir- kaj reiraj biletoj (almenaŭ 3 personoj) validaj 10 tag. (d. kaj f. neenh.). La kosto de tiuj biletoj estas tiu de la ordinara biletoj jam rabatitaj je 33 % malpli: por la 3^a persono, 10 %; por la 4^a, 20 %; por la 5^a kaj ĉiu el la pliaj, 30 %.
- III. Ordinara ir- kaj reiraj biletoj, validaj 30 tag. (d. kaj f. enhavataj) kun 25 % da rabato en 1^a kl. kaj 20 % en 2^a kaj 3^a kl.

Tuja livero de la biletoj de 10^a de Aprilo ĝis 31^a de Okt. 1908, en ĉiuj stacidomoj.

La valideco de ĉiuj biletoj estas plidaŭrigebla 2 fojojn po duono propagante, pro ĉiu daŭrigo aldonan koston egalan al 10 % el la bileta prezo.

Librairie de l'Esperanto

Al samideanoj en la tuta mondo.

GRAVA AVIZO.

NI povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn NE esperantajn.
NI akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo.
NI aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto.
NI sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l'Esperanto 15, Rue Montmartre Paris.
(Internacia esperantista librejo)

LA INTERNACIA TRINKAJO VISKIO ESPERANTO

Registered Trade Mark

N^o 270,042

Marque Déposée

N^o 13,195

Registered Label N^o 272,434

LA OFICIALA VISKIO DE LA TRIA KONGRESO

Buchanan, Scott & C^o

Garthland Street

GLASGOW (Skotlando).

Kaprico.

De ALFRED DE MUSSET. (1)

ŜAVINJI.

Seu ia dubo mi portos tiun ĉi. Tio estas la sola rimedo por scii, kiu ĝin faris.

S^{rino} DE LERI.

Mi ne komprenas; tio estas tro neklarigebla por mi.

ŜAVINJI.

Mi supozas, ke la sendintino ĝin vidos morgaŭ en miaj manoj, ĉu vi kredas, ke mi eraras?

S^{rino} DE LERI ekridegante.

Ha! Tio estas tro amuza; mi ne povas deteni mian ridon.

ŜAVINJI.

Ĉu ĝi estus vi, eble?

Silento.

S^{rino} DE LERI.

Jen via teo preparita de mia blanka mano, kaj ĝi estos pli bona ol tiu, kiun vi antaŭ momento fabrikis por mi. Sed ĉesu do rigardi min. Ĉu vi kredas, ke mi estas anonima letero?

ŜAVINJI.

Ĝi estas vi, tio estas ia gajserco. En tio ĉi estas konspiro.

S^{rino} DE LERI.

Ĝi estas konspiro bonete trikita.

ŜAVINJI.

Konfesu do, ke vi partoprenis en ĝi.

S^{rino} DE LERI.

Ne.

ŜAVINJI.

Mi vin petas.

S^{rino} DE LERI.

Sen pli da sukceso.

ŜAVINJI.

Mi vin petegas.

S^{rino} DE LERI.

Genue petu pri tio, mi ĝin diros.

ŜAVINJI.

Genue? Tiel longe kiel vi volos.

S^{rino} DE LERI.

Bone! Nu!

ŜAVINJI.

Ĉu serioze?

Li ridante genuas antaŭ S^{rino} de Leri.

S^{rino} DE LERI, tranĉe.

Mi ŝatas tiun ĉi sintenadon, mirinde ĝi konvenas por vi; sed mi konsilas, ke vi relevigu por ne tro kortuŝi min.

ŜAVINJI, relevigante.

Do, vi nenion diros, ĉu ne?

S^{rino} DE LERI.

Ĉu vian bluan monsaketon vi havas tie ĉi?

ŜAVINJI.

Mi ne scias, mi kredas jes.

S^{rino} DE LERI.

Mi ankaŭ kredas jes. Donu ĝin al mi, mi diros, kiu faris la alian.

SAVINJI.

Vi do ĝin scias?

S^{rino} DE LERI.

Jes, mi tion scias.

ŜAVINJI.

Ĉu virino?

S^{rino} DE LERI.

Escepte se ĝi estas viro, mi ne vidas....

ŜAVINJI.

Mi volas diri: ĉu beleta virino?

S^{rino} DE LERI.

Ĝi estas virino, kiu, laŭ via opinio, estas unu el la plej beletaj virinoj en Parizo.

ŜAVINJI.

Ĉu brua aŭ blonda?

S^{rino} DE LERI.

Blua.

ŜAVINJI.

Per kiu letero komenciĝas ŝia nomo?

S^{rino} DE LERI.

Ĉu vi ne volas akcepti mian pakton (2)? Donu al mi la monsaketon de S^{rino} de Blenvilo.

ŜAVINJI.

Ĉu ŝi estas malgranda aŭ granda?

S^{rino} DE LERI.

Donu la monsaketon.

ŜAVINJI.

Diru nur, ĉu ŝia piedo estas malgranda?

S^{rino} DE LERI.

La monsaketon aŭ la vivon!

ŜAVINJI.

Ĉu vi diros la nomon, se mi donos al vi la monsaketon?

S^{rino} DE LERI.

Jes.

ŜAVINJI, eligante la bluan monsaketon.

Vian honoran vorton!

S^{rino} DE LERI.

Mian honoran vorton.

ŜAVINJI, ŝajnas sendecida, S^{rino} de Leri etendas la manon, li atente ŝin rigardas. Subite li sidigigas apud ŝi, kaj gaje diras:

Ni parolu pri kaprico. Vi do konsentas, ke virino povas havi kelkajn?

S^{rino} DE LERI.

Ĉu vi ankoraŭ nescias tion?

ŜAVINJI.

Ne tute; sed povas okazi, ke edzigita viro havos du parolmanierojn, kaj, ĝis ia limo, du agmanierojn.

(1) Fino. Vidu la Marlan Numeron. — (2) Lat.: pactum. Fr.: pacte. Ang.: pact. Hisp.: pacto. It.: patto.

S^{ino} DE LERI.

Nu! kaj nia pakto, ĉu ĝi ekforflugas? Mi kredis, ke ĝi estas konkludita.

ŜAVINJI.

Edzigita viro estas malgraŭ tio viro; la beno ne aliigas lin, sed kelkafoje ĝi devigas, ke li prenu rolon kaj sciu ĝiajn respondojn. En tiu ĉi mondo, la afero estas nur scii, kiu estas la alparolato, ĉu li estas la realulo aŭ la ŝajnulo, la persono aŭ la personaĵo.

S^{ino} DE LERI.

Mi komprenas, oni povas elekti; sed kio gvidas la publikon?

ŜAVINJI.

Mi ne kredas, ke por sprita publiko tio estas longa nek tre malfacila.

S^{ino} DE LERI.

Vi do forlasas la deziron, ekscii tiun multvaloran nomon? Nu! Cedu! Donu al mi tiun monsaketon.

ŜAVINJI.

Sprita virino, ekzemple (tiom da aferoj scias sprita virino!), ne povas erari, laŭ tio kion mi opinias, pri la vera karaktero de l' homoj: ŝi bone vidas unuavide.

S^{ino} DE LERI.

Reale, vi do konservas la monsaketon?

ŜAVINJI.

Ŝajnas al mi, ke vi multe ĝin deziras. Sprita virino devas konscii la rolon de l' edzo, kaj sekve la rolon de l' viro, ĉu ne vere, sinjorino? Kiel do vi estas kapornamita? Hodiaŭ matene vi estis tute florumita.

S^{ino} DE LERI.

Jes, tio min ĝenis, mi min liberigis el ili. Ha! Dio mia! unuflanke miaj haroj estas malligitaj. Ŝi leviĝas kaj aranĝas ilin antaŭ la spegulo.

ŜAVINJI.

Vi havas talion kiel eble plej beletan. Tia sprita virino kiel vi...

S^{ino} DE LERI.

Tia sprita virino kiel mi sin fordonas al la diablo, kiam ŝi rilatas al tia sprita viro kiel vi.

SAVINJI.

Estas negrave; mi estas boneta diablo.

S^{ino} DE LERI.

Ne por mi, almenaŭ laŭ mia opinio.

ŜAVINJI.

Ŝajne tial ke iu alia malutilas al mi.

S^{ino} DE LERI.

Kion signifas tiu ĉi diraĵo?

ŜAVINJI.

Ĝi signifas, ke se mi malplaĉas al vi, la kaŭzo estas ke iu malhelpas, ke mi plaĉu al vi.

S^{ino} DE LERI.

Tio estas modesta kaj ĝentila; sed vi eraras: neniu plaĉas al mi, kaj al neniu mi volas plaĉi.

ŜAVINJI.

Je via aĝo kaj kun tiuj ĉi okuloj, mi ne kredas al vi.

S^{ino} DE LERI.

Tamen tio estas la senmiksa vero.

ŜAVINJI.

Se mi kredus al tio, vi naskus en mi tre malbonan opinion pri la viroj.

S^{ino} DE LERI.

Tre facile mi tion kredigos al vi. Mi havas malhumilecon, kiu ne volas ĉefon.

ŜAVINJI.

Ĉu ĝi ne povas toleri servanton?

S^{ino} DE LERI.

Ho! servantoj aŭ ĉefoj, vi estas nur tiranoj.

ŜAVINJI, leviĝante.

Tio estas iom vera, kaj mi konfesas, ke pri tio mi ĉiam malŝatis la konduton de l' viroj. Mi ne scias, de kie venas al ili tiu manio sin trudi, kiu utilas nur por ilin malamigi.

S^{ino} DE LERI.

Ĉu tio estas via sincera opinio?

ŜAVINJI.

Tre sincera; mi ne konscias, kiel oni povas konvinki sin, ke tial ke oni plaĉis hodiaŭ vespere, morgaŭ oni rajtos malbonuzi tiun privilegion.

S^{ino} DE LERI.

Tamen tio estas la unua ĉapitro de l' universala historio.

ŜAVINJI.

Jes, kaj se la viroj havus saĝon pri tio, la virinoj ne estus tiel singardaj.

S^{ino} DE LERI.

Eble; la hodiaŭaj amligoj estas edziĝoj, kaj kiam la afero rilatas al edziĝa tago, tio meritas, ke oni pripensu pri ĝi.

ŜAVINJI.

Vi estas milfoje prava; kaj, diru al mi, kial tiel estas? Kial tiom da komedio kaj tiel malmulte da sincereco? Ĉu belulino, kiu fidus al bonedukitulo, ne scius lin distingi? Sur tero ne estas nur malsprituloj.

S^{ino} DE LERI.

En tia cirkonstanco tio estas demando.

ŜAVINJI.

Sed mi supozas, ke, okaze, estas viro kiu pri tiu ĉi punkto ne opinias kiel la malsprituloj; kaj mi supozas, ke fariĝas okazo, dum kiu oni povas esti malkaŝema sen danĝero, sen kaŝita penso, sen timo pri maldiskretaĵoj.

Li prenas ŝian manon.

Mi supozas, ke oni diras al virino: Ni estas solaj, vi estas juna kaj bela, kaj kiel konvenas, mi ŝatas vian spriton kaj vian koron. Mil baroj nin apartigas, mil ĉagrenoj nin atendas, se ni penos nin revidi morgaŭ. Via fiereco ne volas jugon, kaj via singlaro ne volas ligilon; nek unu nek la alian vi havas por timi. De vi oni petas nek amcertigon, nek promeson, nek oferdonon, sed nur rideton de tiuj lipoj kiel rozoj, kaj rigardon de tiuj belaj okuloj. Ridetu dum tiu ĉi pordo estas fermita: via libereco estas ĉe

la sojlo ; forlasante tiun ĉi ĉambron vi ĝin retrovos ; kio sin proponas al vi, tio ne estas la plezuro sen amo, sed la amo sen malplezuro kaj sen maldolĉeco : tio estas la kaprico, ĉar ni parolas pri ĝi, ne la blinda kaprico de l' sentoj, sed tiu de l' koro, kiun momento naskas, kaj kies memoro estas eterna.

S^{rino} DE LERI.

Al mi vi parolis pri komedio ; sed laŭvide vi ludus okaze komediojn iom danĝerajn. Antaŭ ol respondi tiun ĉi paroladon, mi deziretas havi kapricon. Ŝajnas al mi, ke estas la momento tiel agi, ĉar vi pledas tiun tezon. Ĉu tie ĉi vi havas ludkartaron ?

ŜAVINJI.

Jes, en tiu ĉi tablo ; kion vi volas fari per ĝi ?

S^{rino} DE LERI.

Donu ĝin al mi ; mi havas mian kapricon, kaj vi estas devigata obei, se vi ne volas vin kontraŭdiri.

Ŝi prenas unu karton el la kartaro.

Nu, Grafa Moŝto, diru ruĝa aŭ nigra.

ŜAVINJI.

Ĉu vi volas diri el kio konsistas la vetaĵo ?

S^{rino} DE LERI.

La vetaĵo estas diskrecio (1).

ŜAVINJI.

Tiel estu. — Mi diras ruĝa.

S^{rino} DE LERI.

Ĝi estas la pikbubo ; vi malgajnis. Donu al mi tiun bluan monsaketon.

ŜAVINJI.

El mia tuta koro ; sed mi konservas la ruĝan, kaj kvankam ĝia koloro malgajnis min, pri tio mi neniam ĝin riproĉos ; ĉar mi scias tiel bone kiel vi, kiu mano ĝin faris por mi.

S^{rino} DE LERI.

Ĉu tiu mano estas malgranda aŭ granda ?

ŜAVINJI.

Ĝi estas ĉarma kaj glata kiel atlaso.

S^{rino} DE LERI.

Ĉu vi permesas, ke ĝi kontentigu ĵaluzeton ?

En la fajron ŝi ĵetas la bluan monsaketon.

ŜAVINJI.

Ernestino, mi vin adoras.

S^{rino} DE LERI, rigardas bruladi la monsaketon. Si alpaŝas al Savinji, kaj ameme diras al li :

Vi do ne amas plu S^{rino} de Blenvilo ?

ŜAVINJI.

Ha ! Dio granda ! neniam mi ŝin amis.

S^{rino} DE LERI.

Nek min ankaŭ, sinjoro de Ŝavinji.

ŜAVINJI.

Sed kiu do diris al vi, ke mi pensas pri tiu virino ? Ha ! Ne de ŝi mi petos feliĉan momenton ; ne ŝi ĝin donos al mi !

S^{rino} DE LERI.

Nek mi ankaŭ, sinjoro de Ŝavinji. Por mi vi ĵus plenumis ofereton, vi estas tre amindumema ; sed

mi ne volas vin trompi : la ruĝa monsaketo ne estas mia faritaĵo.

ŜAVINJI.

Ĉu estas eble ? Kiu do ĝin faris ?

S^{rino} DE LERI.

Mano pli bela ol la mia. Faru al mi la plezuron pripensi unu minuton, kaj viavice klarigi tiun ĉi enigmon. En bona franca lingvo, vi faris al mi tre amindan amkonfesion ; vi plene surgenuis teren, kaj rimarku, ke ne estas tapiŝo ; mi petis pri via blua monsaketo, kaj vi permesis, ke mi ĝin bruligu. Kiu do mi estas, diru, por ĉion ĉi meriti ? Kion tiel eksterordinaran vi trovas sur mi ? Mi ne estas malbela, tio estas vera ; mi estas juna ; estas certe ke mi havas malgrandan piedon. Sed fine tio ne estas tiel malofte renkontata. Kiam ni estos pruvintaj unu al la alia, ke mi estas koketulino kaj vi malĉastulo, unike tial ke estas noktomeze kaj ni estas tute solaj, jen heroaĵo skribota en nia Memorlibro ! Tamen tio estas ĉio, ĉu ne ? Kaj kion vi ridante donas al mi, kio ne naskas en vi eĉ bedaŭron, tiu sensignifa ofero, kiun vi plenumas por kaprico ankoraŭ pli sensignifa, tion vi rifuzas al la sola virino, kiu vin amas, al la sola virino, kiun vi amas !

Oni aŭdas bruon de veturilo.

ŜAVINJI.

Sed, sinjorino, kiu do vin sciigis pri tio ?

S^{rino} DE LERI.

Parolu pli mallaŭte, sinjoro, jen estas ŝi, kiu revenas, kaj tiu veturilo venas por mi. Mi ne havas la tempon necesan por al vi fari riproĉon ; vi estas altkora viro, kaj via koro tion faros. Se vi trovos, ke la okuloj de Matildo estas ruĝaj, elviŝu ilin per tiu monsaketo, kiun ŝiaj larmoj rekonos, ĉar ĝi estas via bona, honesta kaj fidela edzino, kiu pasigis dek kvin tagojn farante ĝin. Adiaŭ ; hodiaŭ vi koleretos pri mi, sed morgaŭ vi sentos iom da amikeco al mi, kaj kredu min, tio estas pli preferinda ol kaprico. Sed se vi absolute bezonas unu, rigardu, jen Matildo, vi do povos havigi al vi unu belan, hodiaŭ vespere. Ĝi forgesigos al vi, mi esperas, alian, kiun neniu en la mondo, eĉ ŝi, iam ekscios.

Matildo eniras. S^{rino} de Leri iras renkonte al ŝi, kaj kisas ŝin ; S^{rino} de Ŝavinji ilin rigardas, alpaŝas al ili, deprenas sur la kapo de sia edzino la florgirlandon de S^{rino} de Leri, kaj ĝin redonas al tiu ĉi, dirante :

Vi eraras, sinjorino, ŝi tion ekscios, kaj neniam mi forgesos, ke juna pastro faras la plej bonajn predikojn.

Tradukita de

JOHANINO FLOURENS,

H. M. de la E. Vagabonda Klubo.



(1) Oni nomas diskrecio veton post kiu la perdinto estas devigata doni al la gajninto, kion liu ĉi petas de li. (Noto de l' aŭtoro)



La Norvega edziniga krono.

Originalo de Pastro J. BEVERIDGE, M. A. B. D. (Skotlando).

Ĉe epoko, kiam bedaŭrinde iom post iom malaperas la lokaj kutimoj kaj kostumoj, estas interese fiksi por la estonto, tiujn, kiuj ankoraŭ konserviĝis. Tian laboron entreprenis, por Norvegujo, kun la helpo de la Norvega registaro, unu el niaj plej distingindaj Samideanoj, Rev. John Beveridge, ŝatata Skota aŭtoro.

Ni estas feliĉaj enpresi hodiaŭ unu ĉapitron de la verko, eldonota angle kaj Esperante, kies fruigon (1) la aŭtoro deziris doni al niaj legantoj. Tre kore ni ĝin dankas pro lia afabla intenco. (2)



VOSSESTRANDA KRONO.

Diservo dimanĉa en Norvegujo, precipe en la kamparaj kvartaloj, estas ĉiam interesplena. La gajaj kostumoj de la virinoj, la strangaj vestaĵoj de la pastroj, la nekutima muziko, kaj ja ĉiuj ceremonioj de l'adorado, havas ĉarmon senintermankan, eĉ por tiuj, kiuj tute ne konas la lingvon norvegan. Sed, ian tagon, ni ĝuis la privilegion ĉeesti je tia Diservo, en preĝejo historia, kiam mesfaris fama pastro, kaj kiam interesa edziĝo estis solenigata. Kaj sufiĉe da la lingvo ni konis, por havi la eblon kompreni ĉion, kio estis dirata.

Ni estis vizitantaj la paroĥon de Norderhovo, je interspaco de kvindek kilometroj de Christiania'o. Antaŭ la tiea malnova preĝejo staras bela kolono portanta la jenan surskribon — « Anna Colbjørnsdatter, 1716 ». La sinjorino, kies memoron la monumento daŭrigas, estis la inda edzino de la paroĥa pastro de antaŭ du centjaroj. Ni eniris la preĝejon kaj tuj la pedelo, vidante ke ni estas fremduloj, demandis, ĉu ni volus malsupreniri en la subteraĵon. Ho jes! Li malfermis plankordon en la ĥorejo, kaj nin kondukis malsupren. Tie, al ni li montris ne nur la ĉerkojn de Anna kaj ŝia edzo, sed ankaŭ iliajn balzamumitajn korpojn, ĉar la ĉerkoj havas vitrajn kovrilojn. La subteraĵo estis tute malluma, kaj, per la lumo de unu sola kandelo, la mallumo estis ne tiel forpelata, kiel kontraste plidensigata.

La preĝejo estas ŝtona konstruaĵo de tre frua periodo de norvega Kristianismo. La nomo, Norderhovo, sciigas, ke la preĝejo okupas la lokon, kie, en la tagoj de l' idolservado, staris templo dediĉita al Njord. Ĝi estis priskribita jam antaŭ 1297, sed pro ĝia perfekta Romana fasono, ĝi kredeble konstruiĝis ĉirkaŭ 1200.

La konstruaĵo certe estas pligrandigita en pli postaj tempoj, sed ĝi estas la sama preĝejo, en kiu almenaŭ dudek generacioj da gekristanoj estas adorintaj.

La monumento memorigas la pastran edzinon; sed kial ĝi montras la daton, 1716ⁿ jaron, kiu rilatas je nek ŝia naskiĝo nek ŝia morto? En la jaro 1716^a, estis militado inter Svedujo kaj Norvegujo. La komuna tradicio diras, ke taĉmento da Svedaj soldatoj estis sendata por rabadi la arĝentajn minojn de Konsbergo. Ian vesperon, sur la vojo tien, la Svedoj atingis Norderhov'an paroĥestrejon, kaj la pastredzino ŝajnis rilati tute amike al ili. Ŝi provizis la simplajn soldatojn per manĝaĵo kaj biero en la garbejo kaj pajlejo, kaj ŝi elregalis la oficirojn per la plej bona nutraĵo, kiun la paroĥestrejo enhavis. Sed en ŝia ŝajna zorgemeco por ŝirmi la soldatojn kontraŭ la vintra nokta severeco, ŝi ekbruligis lignan amason. La fajrego rapide avertis la ĉirkaŭaĵon, kaj meze de la nokto bando da norvegaj soldatoj alvenis, ĉirkaŭis la paroĥestrejon, kaj mortigis aŭ kaptis ĉiujn Svedojn. Oni ankoraŭ populare nomas la ĉambron, en kiu la oficiroj estis regalataj, Svenske-stue, t. e. la sveda

(1) France: primeur. — Germ.: erstgenuss. — (2) La klišaĵoj estas elliritaj el la estonta volumo.

ĉambro. La paroĥestrojo, tamen, ŝajnas tiel freŝa kaj nova, ke oni apenaŭ povas kredi, ke ĝi estas malnova ducentjara. Tio estas la tradicio, kaj tie ĉi estas monumento al la kuraĝega Anna; kaj mal-supre en la subteraĵo oni ankoraŭ povas vidi ŝian vizagon, sur kiu ankaŭ oni povas facile legi la econ kaj rimedemon, kiuj al ŝi estas alligitaj.

La interno de la preĝejo estas tre ornamita. La baptakvujo, predikseĝo, baldakeno estas plej bele skulptitaj. La altara pentraĵo estas multe pli ellaborita ol tiu de la plej multaj Norvegaj preĝejoj, kaj konsistas el diversaj enkadraĵoj. Bonega pentraĵo de Kristo preĝanta okupas la plimalsupran parton, kaj belfarita krucumo la plisupran.

La vetero estis varmega, kaj la adorantoj ŝajnis feliĉaj forigi de la brulantaj sunradioj. Ĉar la fenestroj estis plene malfermitaj, la preĝejo interne estis kompare malvarmeta, la aero belsona per la kantoj de la birdoj, kaj dolĉa per la bonodoro de la trifolio kaj floroj. La maljunuloj unue alestis, kaj faris grandan parton de la ĉeestantaro. Ifoje ia virino eniris, vestita per nekutima kostumo, sed la plimulto estis vestita per la tiea virinvesto, treege pentrinda. Ĉiu virino portis biblion kaj naztukon en la mano. Tre multe da infanoj ĉeestis, kaj kompare malmulte da gejunuloj. La preĝejo tre pleniĝis, kiam la sonorilo eksonis por la preĝo, sed la sonorado daŭris nur mallongatempe kaj subite ĉesis.

La predikanto estis lia provosta Moŝto, Pastro M. J. Færden, tre elokventa klerulo kaj fama parolanto kaj aŭtoro. Li havas vizaĝon fortan, voĉon plaĉan, parolmanieron bonegan, kaj impresan kutimon hejmenpreni la veron. La Diservo komenciĝis per la paroĥa ekleziulo. Iom poste aŭdiĝis la voĉo de la mesfaranta pastro, kantadanta apud la altaro. Tiam la ĉeestantaro leviĝis, kaj kune kantis malrapidan multstrofan psalmon, dum la orgeno harmonie ludis. Dum la unua parto de la Diservo

kredeble iom konfuziĝis la pastro, pro la multaj enirantoj penadantaj por trovi sidejon aŭ starejon. Sed kiam lia provosta Moŝto en la predikejon eniris, kaj altigis siajn manojn en preĝo fervora, estis silentego kaj, ĉu en, ĉu el, ĉesis ĉia movado.

Post la prediko estis mallonga intertempo, dum kiu kelke da ĉeestantoj eliris. La geknabetoj precipe estis ĝojaj, ke nun oni povas liberigi ilin de l' enfermo en la preĝbenkoj; kaj ili diskuradis en la preĝejkorto, elŝirante florojn de la herbaĵo. La pli maljunaj kamparanoj sin intersalutis en la vestiblo, kiam malproksima pafo ĉies atenton ekaltiris. La

pafo ŝajnis pli plaĉi al la tieuloj ol timigi ilin. Baldaŭ la sono de violonludo ekaŭdiĝis, kaj post nemultaj minutoj tre pentrinda procesio da gaje vestitaj personoj eniris en la preĝejon, kaj starigis ĝustaloke apud kaj ĉirkaŭ la altarbariloj.

Edziĝo estis solenigota. Antaŭe, flanko ĉe flanko en la ĥorejo, kontraŭ la altaro, staris la du geedziĝontoj. La edziĝonto estis akompanata de sia sekvantaro, ĉiuj nigreblue vestitaj. La fianĉino, ŝargita per multe da arĝenta juvelaro, sammaniere estis akompanata de kelkaj fraŭlinoj, ĉiuj vestitaj per la belaj tieaj kostumoj. Sur sia kapo la edziniĝonta portis strangan kronon. Kutime la edziniĝa krono estas alta je kvar ĝis ses coloj; sed en ĉiu valo ĝi havas sian apartan formon. La krono estas el arĝento, of-



LA NORVEGA EDZINIĜA KRONO.

te orumita, kaj ĝi havas multe da pendaĵoj, sonetantaj kaj tintantaj ĉe ĉiu paŝo. La portado de la krono kontraŭstaras ĉian mallaŭdon je la bona reputacio de la edziniĝontino. Tiun dimanĉon en la Ullenstang'a preĝejo ses paroj estis edziĝotaj, sed estis nur kvin kronoj. El la edziniĝontaj unu, la plej malriĉa kamparulino el ĉiuj, estis ĉagrenega, timante, ke pri ŝia ĉasteco oni dubos, ĉar ŝi nenian kronon portas. Kiel plej bonan rimedon ŝiaj amikinoj por ŝi faris kronon el sovaĝaj floroj. Kiam la grupo da geedziĝontoj ĉe la altaro apudestis, la pastro



LA SULDALA KRONO.

jam de longe malaperis en Anglujo, kaj nur per la florkronoj de Majaj Reĝinoj kaj la raportoj en literaturaj verkoj oni povas sciigi, kaj tio neperfekte, kion la edziniĝaj kronoj similis. Sed la norvegaj kronoj, kiuj ankoraŭ estas uzataj, povas doni al ni ian ideon pri la kronoj antaŭ longe portitaj de Anglosaksaj edziniĝontintoj. En la dekseca centjaro, la kalkuloj de l' administrantoj de la Sanktulina Margareta preĝejo de Westminstero enhavas tiun ĉi eron « 1560^a, la 26^{am} de Sept^o. Al Alico Lewis, orajstredzino en Londono estas pagitaj 3 funtoj 10 ŝilingoj por edziniĝa kroneto » kaj de Chancero, en lia Oxforda Ekleziula Antaŭverko, oni havas multe da raportoj rilate al la kutimo porti edziniĝajn kronojn.

En la farmodomo de Moera-bai'o en Numedalo estas belega edziniĝa krono. La tradicio diras, ke ian nokton juna kamparulo estis pasanta apud montfarmeto. Li surprizigis, vidante lumojn kaj aŭdante gajajn sonojn, kaj li sin ekgratulis antaŭvidante ĝojegan nokton. Sed kiam li enrigardetis tra la fenestro en la ĉambron, li estis okulvidanto ĉe huldra, t. e. feina edziĝo. Preskaŭ ĉio similis ordinaran homan edziĝon. La edziniĝontino, tamen, estis la plej belega estaĵo, kiun li iam vidis. Li malfacile povis deturni siajn okulojn de ŝia alloganta vizaĝo, ŝia rava vestaĵo, kaj ŝia masiva krono argenta. La juna kamparulo enamiĝis la huldrinon, kaj li decidis edziniĝi kun ŝi. Li do tra la fenestro ĵetis sian poŝtrancilon super ŝian kapon. Tuj ĉiuj feinoj malaperis escepte la edziniĝontan, kiun la ĉarmo de la ŝtalo enkatenigis firme alla skabelo, kie ŝi sidis. La enamiĝinta junulo al la huldrino faris amesprimon, kaj al lia hejmo ŝi lin akompanis. Siatempe ŝi estis baptata, kaj poste ili geedziĝis. Komence la bovinvosto surkreska, kiun ĉiu huldrino portas, vidiĝis el sub ŝia rava edziniĝa vestaĵo — sed iom post iom, la vosto malaperis. La kamparulo kaj lia feina edzino longe kaj feliĉe kunvivis; kaj iliaj posteuloj ankoraŭ fiere siajn prapatrojn memorigas, kaj ŝatas treege la huldran edziniĝan kronon.

J. BEVERIDGE.



Ni havas sub la okuloj interesan broŝuron « La Sendependa ordeno de la Bontemplanoj », de D^o Legrain, ĉefkuracisto ĉe la rifuĝejo en Ville-Evrard, bonege tradukitan de P^{ro} Gautrot, kaj eldonitan de l' pariza grupo de la esperantistaj bontemplanoj (1, rue Christine, Paris: 40 c., 16 Sd.). Oni scias, kiel la bontemplanoj fervore subtenas Esperanton. Reciproke la esperantistoj devas interesiĝi al iliaj tiel utilaj penadoj.

vidis la florkronitan fianĉinon, kiu modeste lokis sin mem malantaŭe. Li signodonis, ke ŝi kaj ŝia edziĝonto pliproksimiĝu, kaj al ili li donis la honoran lokon en la mezo. Ja li ŝajnis scii ŝian staton antaŭe, ĉar la temo de l'edziga prediko estis — « Rigardu la liliojn de l' kampo. Eĉ Salomon'o, en sia tuta gloro, ne estis vestita tiel bele, kiel unu el tiuj ĉi ».

Konforme al kutimo, en la daŭro de la soleno, la pastro prezentis al la edziĝonto la jenajn demandojn: « Ĉu vi volas preni tiun ĉi virinon, kiu staras apud vi kiel vian edzinon? Kaj ĉu vi volas kunvivi kun ŝi laŭ la Sankta vorto de Dio, ŝin ami kaj honori, al ŝi esti fidela en tagoj bonaj kaj malbonaj, ĝis la morto vin disigos? » Sammaniere li demandis la edziniĝontinon; kaj, tuj kiam ili estis jesintaj, la pastro diris: « Do, laŭe, unu al la alia donu la manon ». Tiam li bene metis sian manon sur la kunplektitajn manojn kaj poste sur la kapojn de la geedziĝantoj. Dum himno estis kantata, la novgeedzoj ĉirkaŭpromenis la ĥorejon, metis la kutiman pagon por la pastro sur la altaron, kaj foriris el la preĝejo. Tuj kiam la feliĉa paro estis elirinta el la vestiblo, oni pafis per pafiloj, refreŝigaĵoj estis ĉirkaŭpasigataj, kaj la procesio veturis al la domo de la novedzo, kie fariĝis kelktaga edziga festo.

Estas iom interese ekscii, ke la kristianismo estis enkondukata en Norvegujon de Anglujo antaŭ mil jaroj, kaj ke ĉie multe da postsignoj de Anglosaksaj esprimoj kaj kutimoj ankoraŭ estas troveblaj. La uzado, ekzemple, de la edziniĝa krono ŝajnas esti de Anglosaksa deveno. La kutimo kroni la estontan edzinon



EDZINO, NOVEDZINO, FRAŬLINO.

Edmondo de Amicis kaj G. Carducci.

Jen nova doloro por la tutmondaj literaturamantoj kaj eĉ por la tutmonda socialismo. Efektive *E. de Amicis* estis samtempe tre delikata kaj tre grandfama verkisto, kiel oni povas konstati legante la rimarkindajn librojn: Marocco (Marokujo), Olanda (Holandujo), Constantinopoli, Ricordi di Parizi (Memoroj pri Parizo), Ricordi di Londra, Sul l'Oceano, *La floro de l' Pasinto*, teatraĵo prezentita dum la dua kongreso, k. t. p., k. t. p., kaj ankaŭ laborema kaj efika apostolo de la ideo socialista, per siaj verkoj iom pli malmulte konataj: *Romanzo di un Maestro*, *Maestrina degli operai*, *La carrozza di tutti*, kaj fine la tre atendata (nur konata ĝis nun per elĉerpajoj el la gazetoj) (1) *Primo Maggio* (Unua Majo), verko tute kaj varmege socialista.

* * *

Edmondo de Amicis naskiĝis ĉe Oneglia, el familio Genova, 1846. Lia infaneco malvolvigis do tra la atmosfero samtempe romantika kaj patriota de tiuj jaroj mondfamaj pro du malsamaj kaj tamen interligitaj movoj: la unua, literatura kun Victor Hugo kaj Giuseppe Carducci; la dua, nacia kaj socialista kun Louis Blanc kaj Mazzini. Garibaldi estis tiam la vivanta kaj heroo ligilo de la franca-italaj nedaŭraj interrilatoj. Ja, Pio IX^a, Napoleono III^a kaj eĉ Cavour sekvis malsaman vojon. kaj lasis iom solan la italan kaj la francan demokrataron. Garibaldi, nun decide ribelulo, ellevis la standardon de la «ĉemizo ruĝa». Edmondo de Amicis, kvardekjarulo, surmetis varmkore la ruĝan ĉemizon.

Jen venas la epoko de Catalafimi kaj de Palermo (1860). La tuta korjuna Italujo kriegas: Romon aŭ la Morton! Tiun ĉi kanton E. de Amicis kun G. Carducci sonorigas:

Kia voĉo de cial fatalaj (2)
Montetoj, ho Romo, per sankta eĥo sonoras?
 Ho patrino sankta, ho praavoj
 De nia popolo! sur la duobla marbordo,
 Ĉie kie la suno itala flamigas
 En la koroj iom da flameto,
 Ĉiu viro postulas armojn je via alvoko!
 Ĉiu koro batas ventege, brilegas
 Per larmoj kaj fulmoj ĉiu okulo.
 Gloron kaj morton ĉiu dezirego celas.

Tiun voĉon aŭdis unue la atendanto
 De Caprera leono; kun avideco
 Ĝi soifas la batalon, ĝi altlevas la kapon
 Kaj ekkuras. La sanktaj
 Ombroj, ĉirkaŭ la diktatoro ĝis nun sola,
 Svingiĝas kun bruego de ventego.
 Kaj jam fervoro por la grandaj agadoj
 Ekprenas ĉiujn junajn korojn: ilin
 Tuj por jeĵuro ŝajnas avoki
 De Marsala ĝoja sono de trumpetaro
 Disigita de la itala ventoj,
 Ili do lasas la plajn glavojn, la edzinojn karajn,
 Kaj serĉante cin, Romon aŭ tombon,
 Eĉ vunditaj premas la vundon malbone fermitan
 Sub la ruĝa ĉemizo, kaj kuras konfide.

* * *

Edmondo de Amicis mem rakontas en siaj ĉarmaj memoroj ke li forlasis efektive, ne sian dolĉan edzinon (li estis apenaŭ deksejara kaj ne estis ankoraŭ edziĝinta), sed sian amatan patrinon. Li forkuris dum la nokto, kiel rabisto. Sed lia patrino ekkuris post li, kaj lin reprenis. Ŝi eble antaŭvidis la maldolĉan kaj fatalan malvenkon de Aspromonte, kie, laŭ la forta esprimo de G. Carducci, eltirita el Lucano, la vera venkinto estis la venkito.

Kiu venkis cin? Ho! silentu, (3)
 Vantaj kriegoj de triumfo!
 Cin venkis la Amo al la Patrujo,
 Kaj, venkita, ci venkis.

* * *

Li, tiam ne plu junulo, sed oficiro, partoprenis la malfeliĉan batalaron, kiu finiĝis per la malvenkoj de Custoza kaj Lissa. Li priskribis la tutan «militon» kaj tiamaniere komencis sian

senĉesan ellaboraĵon de militista verkisto. Li estis ĝis 1870 direktoro de la ĵurnalo «*Italia Militare*».

Post 1870, tial ke li vidis Romon eltiritan el la mano de la Papo, kaj redonitan al Italujo, li forĵetis la oficialan glavon de la militisto, kaj prenis tutkore la liberan plumon de la verkisto.

De tiu tempo li atingis la gradon kaj, por tiel diri, la superan indecon de apostolo ne nur nacia sed ankaŭ sociala. De tiu tempo, ni konas lin pli bone.

* * *

Edmondo de Amicis estis unu el la plej gloraj favorantoj de la socialista ideo. Li konsideris la socialismon kiel idealisto, ne kiel materialisto: li ne volis batalon, sed edukadon por harmonio estonta inter la klasoj. Eĉ li ne akceptis la deputatecon, kiun al li proponis lia naskiĝa urbeto Oneglia. Kiam en 1898 Torino mem, kontraŭ lia volo, lin elektis, kvazaŭ unuanimе, li rifuzis kaj tuj eksciĝis, dirante. «Oni ne kredu ke mi forlasas la politikan vivon nur pro amo al la trankvileco kaj malamo al la kalumnio. Miaj motivoj estas aliaj. Mi konsideras kiel mian devon, oferi al la ideo, kiun mi servas ĉion, ĉion krom la rimedoj kiujn mi juĝas plej taŭgaj por atingi la celon. Nu! jen estas mia firma kredo: mi ne povas tiun ideon servi pli bone ol restante nur verkisto, ĉar al mi estus «neeble, verki indamaniere, se mi devus rifuzi al mi la solecon,» en kiu mi vivas de kelkaj jaroj.»

La motivoj pli intimaj kaj delikataj de tiu ĉi memvola soleco estis jenaj: li ĵus perdis du amatajn personojn; unue, sian patrinon kun kiu li ĉiam vivadis, due, sian filon. Tiu ĉi lasta estis jam konata literaturisto, kiu, pro cerba ekscitado, kaj malesperante atingi sin idealon, sin mem mortigis. La animo forta de la patro serĉis konsolon en la laboro. Kiel Victor Hugo entombigis sian filinon en la kortuŝantan duan libron de la «*Contemplations*», tiel same E. de Amicis dediĉis al sia filo la lastajn paĝojn de sia literatura ellaboraĵo.

* * *

Li mortis kvazaŭ laborante: kiam li ne plu povis verki, li ne plu povis vivi.

Giovanni Bertauhi kaj Luigi Lucatelli (3) rakontas la lastajn okupadojn kaj pensojn de sia amiko. Li estis, ĝis la lasta horo, samtempe militamanto, sportisto kaj artverkisto. Li ŝategis, ĝis la fino, la pilkludon kaj la pafadon, kaj la morto interrompis lian lastan verkaĵon: *Primo Maggio*.

* * *

Ĉu oni permesos al mi, fine, komparon inter E. de Amicis kaj lia kunvivanto G. Carducci, kiujn oni ne povas, sen maljusteco, apartigi? Efektive ili paralele antaŭeniris. Estas tre interese sekvi ilin tra ilia harmonia kaj tamen tre diversa evolucio, sociala kaj literatura. La samtempeco kaj la diversiteco de iliaj multfakaj ellaboraĵoj estas tre rimarkindaj. Ili naskiĝis preskaŭ samtempe. Ili ambaŭ varme aplaudiis kaj eĉ helpis la italan restariĝon (il rinascimento) de la XIX^a centjaro, kiun Italoj iom malmode taksas samvalore kiel la restariĝon de la XVI^a centjaro. Ili ambaŭ partoprenis la batalojn, kiujn populare kaj juste resumas la honorinda nomo de Garibaldi. Sed, dum G. Carducci, nur skolestro, uzis nesangmakulitan skribilon, E. de Amicis eliris reale la glavon sangosoifantan. Li estis ruĝĉemizulo. Li persone ĉeestis Custoza.

Ili ambaŭ multe skribis. Sed Carducci precipe poezie, E. de Amicis nur proze. Tio ĉi komprenigas, ke Carducci estas multe pli famkonata en la tuta mondo ol E. de Amicis. Fine, G. Carducci neniel parolas klare pri la socialaj problemoj. Eĉ li estas iom rojalisto (reĝano). Li multfoje kantegas la Savojan Krucon, malgraŭ siaj mondkonataj himnoj al Satano, al Robespierre, kaj al Revolucio. Kontraŭe E. de Amicis estis unu el la plej varmaj fervoruloj de la sociala ideo, de la socialismo. Ni, sekve, elektas, kiel la plej honorigan, tiun ĉi funebran paroladon de la socialistaj laboristoj de Italujo. (4) «La plej granda kaj la plej bona el la italaj socialistoj nun estas mortinta. Kun li silentos la buŝo, kiu, dolĉe dirinte la esperon al la homara frateco, ne havis la tempon esprimi,» sen malamo, la triumfon de la tutmonda justeco.»

PAUL BUQUET.

(1) *Speciale Il Secolo de Milano el kiu mi elliras kelke da jenaj klarigoj (12 Marzo 1908)*. (2) G. Carducci. *Levia gravia, Roma o morte*. (3) *Levia gravia, Dopo Aspromonte (Post Aspromonte)*. (4) *Il Secolo, 12^{an}, 13^{an} de Marto*. (5) *Il Secolo 12^{an} de Marto*.



LA AEROPLANO FARMAN.

Lastaj preparoj por la ekflugo, la memorindan 13^{an} de Januaro 1908.

La Aerveturado en 1907. (1)

Henriko Farman, pri kies sukceso parolis nia kunlaboranto de Guesnet en la februara numero, faris novajn mirindaĵojn dum la marta monato, dank'al kiuj oni povas diri, ke la problemo de la aerveturado per aeroplanoj estas solvita. Estas do tute nunca la dua parto de la interesa raporto de nia klera amiko, Profesoro Marcel Finot (2).

LA AEROPLANOJ (AERGLITILJOJ).

Kio estas aeroplano? Ĝi konsistas nur el unu aŭ du surfacoj plataj supermetitaj, kiujn motoro tre malpeza kaj tre fortega antaŭenpuŝas kun granda rapideco. Plato simpla aŭ duobla, alpendigita en aero, tuj falus pro pezforto; se oni provizas ĝin per motoro, kaj se oni iom klinas ĝin al horizonto, ĝi renkontas la aeron ĉirkaŭantan, kies rezisteco sublevas ĝin, des pli multe ke la rapideco estas pli forta, kaj klina angulo pli granda. Tio estas nur la malnova ĥina flugludilo. En tiu flugludilo, la ŝnuro fortiras la surfacon platan klinigitan, kaj la rezisteco devigas ĝin, ke ĝi subleviĝu. En aeroplano, la motoro movas la helikon, kiu kaŭzas la antaŭen-kaj poste la subpuŝon. Sen motoro, ĝi falas; kun motoro, ĝi subleviĝas kaj antaŭeniras. La surfaco estas ja pli malpli ampleksa laŭ la pezo de la aparato kaj de la maŝinoj.

Oni multe riproĉis, antaŭ kelkaj jaroj, mankon devenan al aeroplano: la maŝino ne povas subleviĝi, se ne ekzistas granda kampo por ĝia antaŭenpuŝo, kaj ĝi ne povas malsupreniri sen domaĝo. La dua demando estas facile solvebla: sufiĉas ke oni antaŭenklinu iom la velaron antaŭ la kontakto kun tero: tiel agas kapitano Ferber, kaj lia aparato neniel suferas. Pri la unua, oni scias ja, ke, por ekleviĝi, ĝi devas unue antaŭensalti: nu, aŭ tomobilo, kiu ne subleviĝas, atingas facile grandan rapidecon: estos do sufiĉe, ke oni provizu la aparaton per tre fortegaj motoroj, kaj ke oni faciligu la ekiron per maldikaj radoj de biciklo: tiu genian plibonigon Santos Dumont eltrovis. La aerveturanto ekmovas sian motoron, kiu kaŭzas la turniĝon de la heliko, kies branĉoj, batantaj la aeron, donas al la aparato grandan rapidecon: la aeroplano kuras kiel aŭtomobilo, kaj, post 20-25 metroj, oni klinas iom la velaron, kaj la sistemo rulanta forlasas la teron. Por malfortigi la frotadojn kun tero, oni uzas nur 3, 2, aŭ eĉ unu radon; la aparato rapide flugas ĝis 3, 4, 6, metroj alte.

De du jaroj oni konstruis multajn aparatojn, kaj la nombro de la serĉistoj pli kaj pli kreskas; kvankam ni povas jam citi belegajn rezultatojn, ni povas senpacience atendi aliajn surprizojn, ĉar aeroplanoj bonege konstruitaj de famaj serĉistoj ne eliris ankoraŭ el la laborejoj kaj komencos siajn provojn nur post kelkaj monatoj. Estas kurioze konstati, ke la solvo de la problemo venis nur, kiam oni eltrovis malpezan motoron, kiel tio okazis por la aerostatoj. El siaj kalkuloj, kolonelo Renard estis konkludinta, ke la aerflugado estos ebla, nur

kiam la konstruistoj donos al ni maŝinojn, kies ĉevalpovo pezos nur 1^{kg} 500.

Jam en 1883, Renard donis unuan solvon per pilo klorokromika, liveranta la H P po 44 kgm: tio estas treege malpeza motoro, ĉar la vapormaŝinoj bezonis iam 100, kaj la gazmotoroj 250 kgm, por liveri saman povon. En 1901 Buchet sukcesis malpezigi la petrolmotoron, kiu jam utilis en la aŭtomobiloj, kaj tiel Santos Dumont gajnis la premion Deutsch per motoro de 20 H P peza je 12 kgm po ĉevalpovo. Nu, S^o Levavasseur konstruis fine mirindan motoron *Antoinette* tre malpezan, kies pezo po ĉevalpovo estas 1^{kg} 200. Oni povas do, sub la platoj de la aeroplano, loki motoron de 50-100 H P, pezan je 55-110 kgm. Kia progreso, se oni pripensas, ke oni estis kontenta, antaŭ kvar jaroj, kiam la ĉevalpovo pezis... 10 kgm. La motoro, kiu naskis la direkteblan aerostaton, naskis do ankaŭ la aeroplanon.

La aeroplano H. Farman.

Jam kelkaj aparatoj sukcesis supreniri kaj flugi tra l' aero. La plej feliĉa el tiuj aerflugistoj estas ja H. Farman. Lia aparato konsistas el centra ŝelo longa je 10 metroj, larĝa je 2, farita el du platoj malproksimaj je 2^m 50, alligita al trabo longa je 4^m 50, kiu tenas la ŝelon malantaŭan; tiu ĉi konsistas el du platoj je 6 x 2 metroj; en la centro de la armaturo kuŝas la direktilo; antaŭe estas direktilo por supren-kaj malsupreniro. La aparato apogas sin sur veturileto kun radoj, moveblaj laŭvole, por ebligi malsupreniron, eĉ kontraŭ flanka vento. Motoro de 50 H P movas helikon je 2^m 10 da diametro; rapideco 50 km ĉiuhore. La eksperimentoj, komencitaj en okt. 1907, estis iom post iom sukcesaj; la 15 okt., li superis la rekord'on de 220^m de Santos Dumont, traitante 280^m; li laboris ĉiutage, trairis 5-600 metrojn la 6 nov., kaj la 9 nov. sukcesis turnon je 200 metroj radie al 2 metroj alte. Dum 2 monatoj li plibonigis sian aparaton; fine la 13 jan. 1908 estos memorinda tago en la historio de la aerflugado. La aeroplano de H. Farman rapide subleviĝis, trairis vojon antaŭe montritan, laŭ linio kurba, kaj revenis al la elirpunkto. Li trairis ĉirkaŭe 1500 metrojn dum 1'28", gajnante tiel la grandan premion kreitan de S^{roj} Deutsch de la Meurthe kaj Archdeacon por la aerflugisto, kiu, eliranta el punkto montrita, foriros kaj revenos al la sama punkto.

Malpli feliĉaj estas la multaj aliaj scienculoj, kiuj provis venki la aeron: Enault Pelterie, Ferber, de Pischoff, Vuia, k. t. p. Mi citos nur tiujn, kies eksperimentoj estis plej interesaj.

(1) Fino. Vida la Januaran Nov. — (2) Post verkado de tiu artikolo nova mirindaĵo okazis: la 11^{an} de Aprilo, S^{ro} Delagrange sukcesis traflugi ĉirkaŭe 10 kilom., el kiuj 3.925 m. oficiale kontrolataj en 6 min. 30 s. La tula flugo daŭris 9 m. 15 s.

La aeroplanoj

Delagrance, Wright, k. t. p.

La aeroplano Delagrance konsistas el du ŝeloj tolaj, alligitaj al kadro apogita sur du radoj kaj entenanta la motoron kaj la seĝon de la mehanisto; Voisin direktis ĝin. La 25 sept., ĝi suprenleviĝis ĝis 1^m50 kaj trairis 45 metrojn tre stareme; la 5 nov., Delagrance sukcesis turnon, post traĭro de 150 m., sed poste, por rektvojriri sian aparaton, volis uzi la malantaŭan direktilon, kiu rompiĝis, kaj la aeroplano falis teren, kie ĝi estis tute difektita.

En 1895, amerikano, fizikisto Langley, pruvis, per kalkuloj, ke estos eble subteni aeroplanon en aero, kaj direkti ĝin kun rapideco de 200 km ĉiuhore; li provis eĉ konstrui malgrandan aparaton de 4 x 4 m., peza je 14 kgm., kiun li kondukis sur lagon Potomac kun rapideco de 13 m. ĉiusekunde. Sro Bleriot konstruis, laŭ siaj montroj, aeroplanon, kiu ŝajnas granda birdo kun etenditaj flugiloj; paro da flugiloj longaj je 10 metroj estas fiksitaj al antaŭa parto; du platoj moveblaj agantaj kiel direktiloj kaj staremiloj kuŝas ĉe la malantaŭa parto; kadro ligas la du partojn, kaj entenas motoron kaj kondukanton; heliko kvarbranca estas movita de motoro kvarcilindra de 50 H P. La du flugiloj estas horizontaj dum la flugado kaj vertikalaj dum transporto de la ilo. Li sukcesis, la 11 sept., trairi 60, 90, 120 metrojn, kaj sendomaĝe reveni teren.


Du aliaj lernantoj de Sro Langley, fratoj Wright, faris eksperimentojn pri kiuj oni multe parolis. En 1905, oni diris jam, ke ili konstruis mirindan aparaton, per kiu ili povis trairi 38 km. kun bonega turno, per rapideco de 60 km. ĉiuhore. Oni akceptis tiun sciigon kun granda miro, sed fine oni demandis sin, ĉu tia mirindaĵo estas verŝajna, kaj ĉu oni ne multe pli grandigis la rezultatojn: neniu ĉeestis tiujn provojn, neniu certigis ilian verecon. Oni havas nenian precizan sciigon pri tiu aparato: oni diras, ke ĝi konsistas el du rektanguloj tolaj longaj je 10 m., streĉitaj sur kadro ligna plifortigita per fadenoj ŝtalaj; ĝi havas direktilon vertikalan malantaŭe kaj staremilon horizontalan antaŭe; kaj motoro kun cilindroj horizontaj kuŝas en la centro de la aparato; du helikoj lignaj, kies paletroj estas longaj je 10 m., estas proksimaj unu al la alia. Per tiu aparato do, la problemo de la aerveturado estus solvita de jam 4 jaroj. Se tiu aparato estas tiel mirinda, ni esperu, ke oni vidas ĝin en sept. 1908, ĉe la kurado New-York-Chicago.

Ni povas ankaŭ citi la jenajn aparatojn, kies eksperimentoj malfeliĉe ne estis sukcesaj; la giroplano Breguet, kies subtenplatoj rondturnas, kaj tiel devigas ke la aparato subleviĝu sen antaŭa horizonta movado; ĝi efektive iom subleviĝis la 22 sept. 1907; kaj la aerŝipo Malecot, kombino de aerostato kaj aeroplano.

Oni vidas do, ke la aparatoj estas multaj, kaj ke la problemo de la venko de aero estos baldaŭ efektiviĝita. Tamen, se la maŝino fluganta estas malpli perfekta ol la direktebla aerŝipo, ĝi almenaŭ malpli multe kostas ol ĝi, kiel aĉeto kaj loĝejo: oni povas ekzemple loĝigi ĝin en kia ajn malgranda ejo. Ni povas do pripensi pri la revolucio grandega kaj nekredenda de la taktikoj militaj, de la rilatoj internaciaj, kaj de la vivado de la tuta mondo; kaj multajn demandojn oni povas ankaŭ fari: kiel antaŭgardi sin je la bombardado de aerostatoj? Kiajn murojn konstrui por malhelpi la ŝtelistojn, ke ili eniru en niajn ĝardenojn per aero, kaj la amantojn, ke ili venu forrabi hejmen la belulinojn deziratajn?

LA DIREKTEBLA DE KLUYTMANS.

La nova direktebla de Soj de Kluytmans kaj de Marcey revolucioj preskaŭ la arton de la antaŭenpuŝo de la aerŝipo Ĝis nun la konstruistoj lokis la helikon sub la aerostato: nu, lokita, ĉu antaŭe, ĉu malantaŭe, ĝi ŝanĝas la ekvilibrecon, ĉar al la ago de antaŭenpuŝo ĝi aldonas la suprenradforton, kaj penas sublevi la pinton kontraŭan de la gasujo. Plie



LA DIREKTEBLA DE KLUYTMANS.

la movigado de aero agas malproksime al la maso, ĝi necesigas do grandegajn paletrojn kaj tro grandajn rapidecojn: tiel ekzemple la *Ville de Paris* havas paletrojn longajn je 10 metroj, turnantajn po 140 turnoj ĉiuminute. Kolonelo Renard, kies ĉiuj ideoj iom post iom triumfas, diris: « La antaŭenpuŝilo, la staremilo kaj la direktilo, devus esti lokitaj, kiel eble plej, ne nur en la pezcentro, sed ankaŭ en la mascentro: la plej taŭga loko estas la akso de la aerostato. » La aerostato de Kluytmans, kies silko estas streĉita sur ŝtala fortigilaro, konsistas el du cilindroj sinsekvaj kaj samaksaj, kun interspaco de 20 cm.; la fino de la antaŭa parto estas pinta; tiu de la malantaŭa, duonsfera. La du partoj estas kunligitaj per kvar tuboj metalaj, kiuj reguligas la interspacon kaj la premon de la gaso. En tiu interspaco turniĝas ŝtala rado kun du paletroj longaj je 49 cm., movitaj de motoro lokita en la korbego. La aerostato estas do ĉirkaŭita de granda kaj taŭga moviĝado de aero. La provaerostato (135^m, 137 kgm) atingis rapidecon de 60 km. kun 70 turnoj ĉiuminute. Tiuj rezultatoj estas tiel kuragiĝaj, ke la eltrovistoj intencas konstrui pli ampleksan aparaton.

LA ŜVEBFLUGADO DE LA BIRDOJ.

Por fini tiun tro longan artikolon, mi donas tie ĉi sube la rimarkojn ĉiutagajn faritajn pri la flugo de la birdoj, kiuj kondukas al kuriozaj observadoj kaj al elserĉo de multaj problemoj, por firmigi la staremecon de la aeroplanoj en aero.

1^e La birdoj ŝvebistoj movas siajn plumojn, sed ne movas siajn flugilojn. Ĉu tio estas vera? Kaj tial, ĉu la plumoj utilas nur kiel klapo de supren- kaj malsupreniro?

2^e La ŝvebistoj ŝajnas tre malfacile fortiri sin el tero, kaj, por supreniri, moviĝas rapide kaj mallerte, kurante kiel kokinoj. Poste, kiam ili alvenis ĝis kelkaj metroj el tero, ili senmoviĝas siajn flugilojn kaj trairas helikojn suprenirantajn, kaj tiel atingas altecon ĝis 6000 metroj. La flugiloj ŝajnas tute senmovaj. El kie venas la puŝo?

3^e Kontraŭe al tio, kion oni ordinaro opinias, la grandaj ŝvebistoj estas el la birdoj tiuj, kies surfaco flug la estas la plej malgranda, rilate al ilia pezo. Ekzemple la kondoro havas nur 30 cm. por 450 gramoj, dum pasero samgranda havas 64 cm. Ĉu oni devas konkludi, ke malgranda velaro taŭgas pli por rapideco ol granda?

4^e Krom la amplekso de sia surfaco flugila, la birdo povas ĉiunmomente etendi sian kolon kaj siajn piedojn por ŝanĝi la lokon de sia pezcentro. Santos Dumont sukcesis ankaŭ ŝanĝi laŭvole la lokon de sia pezcentro, sed nur antaŭe, ne sur la flankoj, por ne renversiĝi. Kiel tion atingi?

La problemo de la aerveturado estas do unu el la plej interesaj problemoj studotaj. Sinjoro G. Delbruck, de la sekcio aeronautika de Nice, proponas tiujn problemojn al la fizikistoj kaj matematikistoj, por helpi la solvon tutan kaj logikan de la demando pri la flugo mehanika, kies ekzemplon tiel mirindan donas la birdo.

MARCEL FINOT.

La Fratoj de Mowgli.⁽¹⁾

Verkita de la famega angla aŭtoro RUDYARD KIPLING.

Akela, la Sola Lupo, kuŝis ĉe la flanko de sia ŝtonego, tiel montrante, ke li ne estas plu Estro de la Aro, kaj Shere Khan, kun sia korteganaro da lupojnutritaj per manĝrestaĵoj, marŝadis, nekaŝe estante flatata. Bagheera kuŝis tre apud Mowgli, kaj la fajropoto estis inter la genuoj de Mowgli. Kiam ĉiuj estis kune, Shere Khan ekparolis, kiel neniam li estus kuraĝinta fari, kiam Akela estis pli forta.

«Li ne havas la rajton,» mallaŭte diris Bagheera.

«Diru tion. Li estas filo de hundo. Li timos.»

Mowgli eksaltis sur siaj piedoj.

«Libera Popolo,» li kriis, «ĉu Shere Khan regas la Aron? Kion faras tigro pri nia Estreco?»

«Vidante ke la ofico de Estro estas ankoraŭ neokupata, kaj petite paroli...» komencis Shere Khan.

«De kiu?» diris Mowgli. «Ĉu ni ĉiuj estas ŝakaloj, por humile flati tiun ĉi brutbuĉiston? La elekto de la Estro de la Aro estas por la Aro sole.»

Estis krioj: «Silentu, ci homido! Lasu lin paroli. Li obeis nian Leĝon» kaj fine la plej maljunaj el la Aro tondris: «Lasu la mortintan Lupon paroli.» Kiam estro de la Aro estas malsukcesinta sian mortigon, li estas nomata la «mortinta» Lupo tiel longe, kiel li vivas, kio ne estas longa, ĝenerale.

Akela levis sian maljunan kapon lace:

«Libera Popolo, kaj vi ankaŭ, ŝakaloj de Shere Khan, dum dekdu sezonoj mi kondukis vin al la ĉasado, kaj en tiu tuta tempo, ne unu el vi estis kaptita, aŭ vundita. Nun mi estas maltrafinta mian mortigon. Vi scias, kiel estis farata tiu konspiro. Vi scias, kiel vi renkontigis al mi nepruvitan cervoviron, por ke mia malforteco estu sciata. Lerte tio estis farata. Vi havas la rajton mortigi min tie ĉi sur la Konsila Ŝtonego, nun. Tial, mi demandas, kiu venas igi la finon de la Sola Lupo? Ĉar ĝi estas mia rajto, laŭ la Leĝo de la Junglo, ke vi venu unu post la alia.»

Estis longa silentado, ĉar ne unu lupo ŝatis batali Akela'on ĝis la morto. Tiam Shere Khan blekegis: «Bah! Kial nin okupi pri tiu ĉi sendenta malsaĝulo? Lia sorto estas, esti mortigita. Ĝi estas la homido, kiu jam vivis tro longatempe. Libera Popolo, de la komenco li estas mia manĝaĵo. Donu lin al mi. Mi enuas pro tiu ĉi homida malsaĝeco. Li estas ĝemiginta la junglon dum dek sezonoj. Donu al mi la homidon, aŭ ĉiam mi ĉasos tie ĉi, kaj ne donos al vi eĉ unu oston. Li estas homo, infano de homo, kaj el la medolo de miaj ostoj, mi malamegas lin.»

Tiam pli ol duono de la Aro kriegis: «Homo! Homo! Kion faras homo kun ni? Li iru sian propran lokon.»

«Kaj li turnu ĉiujn popolojn de la vilaĝoj kontraŭ ni?» respondis Shere Khan. «Ne, donu lin al mi. Li estas homo, kaj neniu el ni povas rigardi lin inter la okulojn.»

Akela ree levis sian kapon, kaj diris «Li manĝadis nian manĝaĵon; li dormadis kun ni. Li pelis ĉasaĵojn por ni. Li ne agis kontraŭ unu vorto de la Leĝo de la Junglo.»

«Ankaŭ mi pagis por li per bovoviro tiam, kiam li estis akceptita. Bovoviro valoras malmulte, sed la honoro de Bagheera estas io, por kio li eble batalos» diris Bagheera, je sia plej dolĉa voĉo.

«Bovoviro pagita antaŭ dek jaroj!» la Aro murmuris. «Kion ni zorgas pri ostoj de dek jaroj?»

«Aŭ por garantiaĵo?» diris Bagheera kun siaj blankaj dentoj nudigitaj sub sia lipo. «Rajte vi estas nomataj la Libera Popolo!»

«Neniul homido povas kuri kun la popolo de la junglo», blekegis Shere Khan. «Lin donu al mi.»

«Li estas nia frato je ĉio, krom sango», daŭris Akela; «kaj vi mortigus lin tie ĉi! Vere, mi vivis tro longatempe. Kelkaj el vi estas manĝantoj de brutoj, kaj pri aliaj mi aŭdis ke, laŭ la instruo de Shere Khan, vi iras dum mallumaj noktoj, kaj forprenas infanojn ĉe la pordŝtupo de la vilaĝanoj. Tial, mi scias, ke vi estas timuloj, kaj al timuloj mi parolas. Estas certe, ke mi devas morti, kaj mia vivo valoras nenion, alie mi oferus ĝin por la homido. Sed por la Honoro de la Aro — afereto kiun vi forgesis, estante sen Estro — mi promesas, ke se vi lasos la homidon iri sian propran lokon, mi ne nudigos unu denton kontraŭ vi, kiam alvenos la tempo, en kiu mi devos morti. Mi mortos ne batalante. Tio savos al la Aro almenaŭ tri vivojn. Plu mi ne povas; sed se vi volas, mi povas senigi vin je la honto, kiu venos, se vi mortigos fraton, kontraŭ kiu ne estas ia plendmotivo, frato aĉetita kaj akceptita de la Aro laŭ la Leĝo de la Junglo.»

«Li estas homo — homo — homo!» blekis la Aro, kaj la plej multo ekĉirkaŭis Shere Khan'on, kies vosto ekŝvingiĝis.

«Nun la afero estas en ciam manoj», diris Bagheera al Mowgli, «Ni ne plu povas ion fari, krom batali.»

Mowgli stariĝis kun la fajropoto en siaj manoj. Tiam li etendis siajn brakojn, kaj ocedis antaŭ la vizaĝoj de la Konsilantaro; sed li estis furioza pro kolorego kaj kordoloro, ĉar, lupe, la lupoj neniam estis dirintaj al li, kiom multe ili malamas lin. «Aŭskultu, vi!» li kriis. «Estas senutila tiu ĉi hunda babilajo. Vi tiel ofte hodiaŭ vespere diris al mi, ke mi estas homo (kvankam mi ja estus estinta lupo kun vi ĝis la fino de mia vivo), ke mi sentas, ke viaj vortoj estas veraj. Tial, mi ne plu nomas vin miaj fratoj, sed «sag» (hundoj), kiel homo devas. Tio, kion vi faros, kaj kion vi ne faros, ne estas via afero, sed la mia; kaj, por ke mi povu vidi la aferon pli klare, mi, homo, alportis kun mi iom da Ruĝa Floro, kiun vi, hundoj, timas.»

Li jetegis la fajropoton teren, kaj kelkaj el la fajraj karboj ekbruligis tufon el seka herbo, kiu flamis, dum la tuta Konsilantaro detiris sin de antaŭ la saltantaj flamoj.

Mowgli enpuŝis sian mortan branĉon en la fajron, ĝis la pinto ekbrulis kaj krakis, kaj turnigadis ĝin super sia kapo inter la tremantaj lupoj.

«Ci estas la mastro», diris Bagheera mallaŭte,

(1) Fino. Vidu la Martan numeron. Tiu traduko estas verkita kaj publikigata kun la afabla permeso de la aŭtoro, kaj de la eldonistoj Sroj Macmillan kaj K^o, London.

« savu Akela'on de la morto. Ĉiam li estis cia amiko ».

Akela, la terura maljuna lupu, kiu neniam estis petinta pri kompato en sia vivo, direktis timeman ekrigardon al Mowgli, dum la knabo staris, nuda; liaj longaj, nigraj haroj pendantaj kovris liajn ŝultr-ojn, en la lumo de la flameganta branĉo, kiu saltigis kaj skuis la ombrojn.

« Bone! », diris Mowgli, ĉirkaŭrigardante malrapide, « mi vidas, ke vi estas hundoj. Mi iras de vi al mia propra popolo. La ĵunglo estas fermita por mi, kaj mi devos forgesi vian lingvon kaj vian kunulecon; sed mi estos pli malsevera ol vi. Ĉar mi estis via frato je ĉio, krom sango, mi promesas, ke mi ne perfidos vin, kiam mi estos homo inter homoj, kiel vi perfidis min. » Li piedfrapis la fajron, kaj la fajreroj saltigis. « Ne estas ia batalo inter mi kaj la Aro. Sed estas ŝuldo pagota, antaŭ ol mi foriros. » Li marŝis antaŭen al la loko, kie Shere Khan sidis palpebrumante malsprite pro la flamoj, kaj ekkaptis lin je la hartufo sur lia mentono. Bagheera sekvis, se okazus ia malfeliĉaĵo.

« Ci levu, hundo! » kriis Mowgli, « ci levu, kiam homo parolas, aŭ mi ekbruligos cian felon! »

La oreloj de Shere Khan etendiĝis sur lia kapo, kaj li fermis siajn okulojn, ĉar la flamanta branĉo estis tre proksima.

« Tiu ĉi brutmortiganto diris, ke li mortigus min ĉe la Konsilo, ĉar li ne estis mortiginta min, kiam mi estis ido. Tiele — kaj tiele, ni batas hundojn, kiam ni estas homoj. Ci movu unu vangharon Lungri, kaj mi puŝegos la Ruĝan Floron en cian gorĝon. » Li batis Shere Khan'on sur la kapon per la branĉo, kaj la tigro bleketis kaj murmuretis, pro agonio de teruro.

« Pah! Bruletita ĵungla-kato, foriru nun! Sed memoru, kiam ni revenos al la Konsila Ŝtonego, kiel devas veni homo, ĝi estos kun la haŭto de Shere Khan sur mia kapo. Cetere, Akela iros libere, vivi kiel plaĉos al li. Vi ne mortigos lin, ĉar mia volo tia ne estas. Kaj mi ne pensas, ke vi sidos tie ĉi pli longatempe, pendigante viajn langojn kvazaŭ vi estus Moŝtoj, anstataŭ hundoj, kiujn mi forpelas tiele. For! » La fajro estis furioze brulanta

ĉe la pinto de la branĉo, kaj Mowgli frapis dekstren kaj maldekstren ĉirkaŭ la rondo, kaj la lupoj forkuris blekegante, kun la fajreroj, bruligantaj iliajn felojn. Fine, nur restis Akela, Bagheera kaj eble dek lupoj, kiuj estis subtenintaj Mowgli'on.

Tiam io komencis dolori Mowgli'on, interne, kiel neniam li estis suferinta antaŭe, kaj li ploregis, kaj la larmoj kuris sur lia vizaĝo.

« Kio estas? Kio estas? » Li diris. « Mi ne deziras lasi la ĵunglon, kaj mi ne scias, kio tio ĉi estas. Ĉu mi mortas, Bagheera? »

« Ne, frateto. Tio estas nur larmoj tiaj, kiajn homoj uzas », respondis Bagheera. « Nun, mi scias, ke ci estas viro, kaj ne plu longe estos ido. La ĵunglo ja estos fermita por ci, estonte. Lasu ilin fali, Mowgli. Ili estas nur larmoj. »

Tial Mowgli sidiĝis kaj ploris kvazaŭ lia koro rompiĝus; kaj neniam antaŭe li estis plorinta.

« Nun », li diris, « mi iros al la homoj. Sed unue, mi devos diri adiaŭon al mia patrino; kaj li iris al la kaverno, kie ŝi loĝas kun Patro Lupo, kaj ploris sur ŝian felon, dum la kvar idoj blekegis pro ĉagreno.

« Vi ne forgesos min? » diris Mowgli.

« Neniam, tiel longe kiel ni povos sekvi postsignojn, » respondis la idoj. « Venu al la piedo de la monto, kiam ci estos homviro, kaj ni interparolados kun ci; kaj ni iros ĉe la kulturatan landon, por ludi kun ci nokte. »

« Ci venu baldaŭ! » diris Patro Lupo, « Ho saĝa raneto, ci revenu baldaŭ; ĉar ni estas maljunaj, cia patrino kaj mi. »

« Ci revenu baldaŭ », diris Patrino Lupino, « nuda fileto mia, ĉar, ci aŭskultu, ido de homo, mi amis cin, pli ol iam mi amis miajn idojn. »

« Mi certege venos », diris Mowgli, « kaj kiam mi venos, ĝi estos por streĉi la haŭton de Shere Khan sur la Konsilan Ŝtonegon. Ne forgesi min! Diru al ili en la ĵunglo, ke neniam ili forgesu min. »

Ektagiĝis kiam Mowgli sola malsupreniris la montflankon, por renkonti tiujn misteraĵojn, kiuj estas nomataj homoj.

FINO.

C. W. OXENFORD.

Prezidantino de « E. Vagabonda Klubo », Anglujo.



Dank' al nia « Internacia Enketo pri Edukado ».

Mi havis l'agrablan surprizon legi, en le « Journal de Beaune », la jenan sciigon:

« Higieno ĉe lernejo, tia estis la titolo de konkurso starigita de urbo Barcelono. S^{ro} Bremon, esperantisto, ricevis la 1^{an} premion, ĉar li estis leginta la grandan enketon pri edukado, presitan en « Tra la Mondo ». La komparoj, kiujn li povis fari, certigis al li superecon super liaj konkurantoj. Ja, nur esperantista gazeto povas entrepreni la malfacilan taskon kunigi en tre malmulte da tempo *senperajn* sciigojn devenantajn de ĉiuj mondpartoj. »

Nia franca kunfrato estas tute prava, kaj estas tre bona propagando, diskonigi la ĉi supran fakton. Ni estus dankemaj al S^{ro} Bremon, se li sendus al ni kelkajn sciigojn pri la aluditaj cirkonstancoj.

Je epoko, kiam finiĝas la Esperantaj kursoj, ofte sankciataj per konkursoj inter la gelernintoj, ni rememorigas, ke premio tre ŝatata de la venkinto estas jara abono al « Tra la Mondo ». Jam ankaŭ la lernantoj ofte elektis nian « Ilustraton » kiel dank' esprimon al la sindonaj profesoroj.

Por tiu celo, en la grupoj sufiĉe multecaj estas ankaŭ elektita la bonega « *Poshorloĝo L'Espero* », al kiu la senlaca P^{ro} Bord dediĉis la spritan poezion presitan en nian decembran numeron (1).

Esperanto internacia praktikilo.

La *policanoj* ekinteresiĝas al Esperanto. Nia hungara kunfrato « *Kőzbizkonság* » enhavas en *Esperanto* sciigojn promesplenajn pri la movado en Hungarujo, kiun ĝi subtenas. Niaj propagandaj kunfratoj, interalie *Paris-Esperanto* sciigas pri samaj klopodoj en Parizo, kie P^{ro} Carlo Bourlet faris paroladon antaŭ policistoj, kun la afabla helpo kaj permeso de S^{ro} Lépine, la eminenta polica prefekto de Parizo.

Ni signalu « *L'Espero* », stenografia sistemo tute finita, speciale verkita por Esperanto, de S^{ro} Ch. Barit, stenografisto. 1 fr. 50 afr. ĉe *La Plume Sténographique*. Ni reparolos pri ĝi.

Bonega praktikemo estas ankaŭ la fondo de federacioj, grupantaj agemajn bonvolojn. La *federacio de Bourgogne*, fondita la lastan jaron kun la granda sukceso, kiun scias niaj legantoj, kunvenis en Dijon la 22^{an} de Marto, sub la prezidanteco de Rektoro Boirac. S^{ro} Oubert urbestrohelpanto ĉeestis. 16 grupoj estis reprezentitaj. Oni faris bonegan laboron, post kiu oni sendis fidelecan atestaĵon al D^{ro} Zamenhof, kaj oni gaje festenis.

(1) Por sinjoroj: 30 fr. = 12 sm. — Por sinjorinoj: arĝenta, 45 fr. = 18 sm.; ora, 90 fr. = 36 sm.

NUNTEMPAĴOJ

La elektadaj tumultoj en Lisbono.

La 5^{an} de Aprilo 1908.

Eble interesos la esperantistojn sciigi ion pri la teruraj okazintaĵoj en Lisbono viditan de okulatestanto; precipe ĉar, pro la cenzura malhelpo, la eksterlanda gazetaro ne estas precize informita.

La elektado de la deputitoj okazas en Portugalujo en la vestibloj de la preĝejoj. En tiu ĉi jaro la nombro de la elektantoj estis eksterordinare granda, kaj, pro tio, la publikaj placoj proksime de la preĝejoj estis plenaj je popolo.

La ĉefa centro de la tumultoj estis la placo de São Domingos, kie troviĝas la preĝejo Santa Sunta. Ŝajnas, ke iu homo provis voĉdoni dufoje; kaj ke alia elektanto lin estis observanta tion farantan.

Tiam okazis en la preĝejo tumulteto. Oni bezonis alvoki policanojn, por restarigi la ordon. La popolo kredis, ke la registaro volas malhelpi la liberan voĉdonadon, kaj tumulteto fariĝis, ekstere de la preĝejo, granda tumulto.

La urba gvardio, kies ejo ankaŭ borderas al la placo São Domingos, estis atakata de la popolaĉo per ŝtonoj. 20 minutoj poste la placo kaj ĉirkaŭaĵo de la preĝejo similis al batal-kampo.

Je la 6^a kaj duono mi estis sur la ĉefa placo de Lisbono, nomita la « Rocio ».

Al ĝi borderas la placo São Domingos, kiu tamen ne estis plene videbla ĉe la loko, kie mi staris. Mi sciis ion pri la okazanta elektado, sed mi tute malkonis la gravecon de la afero.

Subite mi aŭdis la ekkrakadon de pafado, kaj vidis forkuregi la popolamason je la kontraŭdirekto de la placo São Domingos, kvazaŭ ĝi estus pelata de la diablo.

Unue mi kredis, ke nova terekruo estis okazinta en Lisbono. Poste mi kredis, ke la freneza forkurado rilatas al la bovovira batalado, kies unua prezentado okazis en tiu ĉi tago; ĉar mi memoris esti vidinta similan frenezan entuziasmon antaŭ kelkaj jaroj en Madrido, kiam post la fino de la bovovira batalado, oni triumfe postkuris la veturilon, en kiu sidis la toreadoroj.

Tiam mi vidis ĉirkaŭ mi la brulantajn paperŝelojn de kugloj ĉie kuŝantaj sur la « Rocio ». Ĉar oni kutimas multe pafadis en Portugalujo dum la festaj tagoj, mi rigardis ankoraŭ la tutan aferon malserioze, kaj kredis, ke la pafado okazis por la festigo de ia sanktulo.

Subite, 20 metrojn proksime de mi, mi vidis homon falantan traŝan, kaj, kiel mi baldaŭ sciigis, mortantan. Tiam mi ekopinias, ke la placo « Rocio » fariĝis ion tro varma por mi, kaj mi ekforkuris, kiel jam longe mi ne estis kureginta, rifuĝante en proksiman kafejon.

La pordo jam estis ŝlosita, sed, eble vidante, ke mi ne havas anarhiistan vidaĵon, oni kompate min ankoraŭ enlasis.

Apenaŭ savinte min el la danĝero, mi vidis bubon, ĉirkaŭe 12 jaran, kiu suprenfaldis sian pantalonon ĝis la genuo.

Li ankaŭ estis trafita, ĉar sango suprenkuradis sian nudan kruron, kiam li, lamirante, elserĉis sendanĝeran rifuĝejon.

Ĝis la oka mi devis resti en la kafejo. La elektra lumo estis estingita, kaj neniu estis nek en- nek ellasata.

La proksiman tagon mi eksciis el la gazetoj, ke tute proksime al mia hotelo sur la placo São Domingos estis naŭ personoj mortigataj kaj 27 vundataj.

En la muroj de la domoj kaj de la preĝejo oni ankoraŭ nun vidas la truojn kaŭzitaĵoj de la kugloj.

Per la sango de la trafitoj oni estis pentrinta krucojn sur la pavimon kaj la blankajn murojn.

Inter du fenestroj mi vidis tion:

† Sangue do marinheiro morto †
(Sango de la mortinta maristo)

Dum a daŭro de kelkaj tagoj regimento de lancistoj patroladis sur la placoj « São Domingos » kaj « Rocio », kaj oni ne kuraĝis forlasi la hotelon. Ĉiam ankoraŭ okazas malgrandaj luktoj inter la popolaĉo kaj la soldatoj, kaj du el ili, antaŭ kelkaj tagoj dum la nokto, oni mortigis per revolvero.

Hodiaŭ, la 14^{an}, la urbo ŝajne rekvietigis, sed oni t'amas, ke novaj tumultoj okazos, kiam la plimulto el la 650 arestitaj estos liberigitaj.

La soldatoj kaj la policistoj kundutis laŭ mia opinio kun takto kaj granda sindeteno. La popolaĉo, el kiu nur tre malmultaj povas legi aŭ skribi, malkomprenis la agon de la militistoj, kiuj nur volis restarigi kaj subteni la ordon dum la elektado. Kontraŭ la freneza konduto de tia needukita amaso disrompanta la pavimon, kaj direktantan hajladon el pavimeroj al la soldatoj, apenaŭ estis alia rimedo ol pafado.

Oni devas ankaŭ kompreni, ke en Portugalujo la soldatoj, kaj ĉiuj, kiuj helpas en la starigo de ordo, estas forte malamegataj de la popolaĉo. Tiu ĉi reciproka malamego estas tiom granda, ke iu generalo, la tagon antaŭ la elekto, petis la reĝon, ke li liberigu lin de la devo subteni la ordon apud la preĝejoj en kiuj okazus la elektado, ĉar iu el liaj kapitanoj estis al li dirinta, ke li ne estus kapabla reteni siajn soldatojn, se incito okazu de la flanko de la popolaĉo.

Tion certigis al mi antaŭ kelkaj tagoj la amerika ĉefkonsulo, kiu post legado de artikolo en « North American Review » fariĝis fervora esperantisto.

Oni ankaŭ devas memori, ke en Portugalujo ĉiu povas voĉdoni, kiu pagas imposton por minimuma jara enspezo de 500 frankoj, kaj kiu havas almenaŭ 18 jarojn.

R. ĈEPEĈ.



Nia amiko ne kontentigis sin nur observante interesajn okazaĵojn, por raporti pri ili al niaj legantoj. Li ankaŭ daŭrigis en Lisbono la fruktoportan propagandon komencitan en Funchal, kaj faris du propagandajn paroladojn en Esperanto. « lingvo, kiun ĉiuj povis kompreni », diris la Libonaj ĵurnaloj, kiuj sendis specialajn raportistojn. La ĉefa « Diario de Noticias » enhavis plurajn artikolojn pri Esperanto.

La paroladoj estis farataj laŭ peto de S^{ro} Louis Aymé, ĉefkonsulo amerika, tre entuziasmema kaj S^{ro} Horner instruisto, kondukanto de la movado en Lisbono.

Al la paroladoj ceestis multaj distingindaj personoj inter kiuj baronino de Tatseu, generalo Argues Moveira, grafo de Mangualde, k. t. p.

Dua grupo: « Grupo esperantista de Madejro », fondiĝis en Funchal.

Ni povas montri hodiaŭ, dank'al la afableco de K^{no} Fortin, kelkajn el la 40 anoj de la Malgaŝa grupo. (Vidu la paĝon 160). Pli ol la duono regule sekvis la kursojn: ili legas kaj skribas kontentige; kelkaj ekparolas. Por pli bone juĝi tiun bonegan rezultaton, oni devas atenti, ke la kurso daŭris nur 4 monatojn kaj duonon, kaj ke kelkaj el la lernantoj konas malmulte la francan lingvon.

STELETO.

La Blarneja Ŝtono.

La movado esperantista en Irlando, ĝis nun iom dormema, ekvigligas, kaj niaj amikoj komencas paroli pri organizaĵo. La jenaj linioj estas la plej bona pruvo de tiu agemo. Proksimigante ilin al la artikolo de Rev. Beveridge kaj la bonega traduko de Fraŭlino Oxenford, oni vidos ke, se ifoje ili estas dividataj pri politikaj aferoj, la tri eroj de la Unuiga Reĝlando de Granda Britujo kaj Irlando konsentas, kaj samkore laboras, por la triumfo de Esperanto.

« Ili estas famaj, ĉar ili kisis la Blarnejan Ŝtonon ».

En la Graflando Korko, en la suda parto de Irlando, sin trovas la Blarneja Kastelo: majesta, malnova konstruaĵo, pri kiu de longe sin interesas la Irlandanoj.

Ĉu ĝia historio kaŭzas tiun ĉi intereson? Ne. Ĝi ne estas tiel multe interesa pro sia historio. Ĝi ne interesas multe kiel antikvaĵo aŭ majestaĵo. La tuta intereso de l' vizitanto koncentriĝas en enkadrigitan Ŝtonon, ŝajne sama kiel la aliaj ŝtonoj de la konstruaĵo. Sed ho!! Dioj!! Kia granda diferenco!!!

Eble ĉiuj ankoraŭ ne konas la rimarkindajn ecojn de tiu ĉi fame konata ŝtono.

Ĉiuj do sciu, ke kiu ajn kisas tiun ĉi ŝtonon fariĝas de tiu momento la posedanto de la jena karakterizaĵo, preskaŭ supernatura: li ekhavas dolĉan, allogan lingvajecon.

Per siaj vortoj kvazaŭ mielaj kaj neniĝemaj promesoj, la kisinto estas ĉiopova por ĉarmegi kaj forŝteli la ameman kaj fideman virinan koron. Li ekposedas ankaŭ tiun pli vulgaran, pli sensencan elokventecon, kiu taŭgas ekzemple por la parolantejo. En tiu ĉi lando, nur malsaĝulo, ne kisinte la Blarnejan Ŝtonon, enirus en la juĝejon kiel advokato. Ĉar ĉiuj scias, ke advokato, helpata per Blarneja elokventeco, povas pentri sankta iun ajn, eĉ la di: blon mem. Kaj vidu la rezultaton — la advokataro irlandano estas la plej lerta, la plej fama el la Britaj Insuloj. — Sir Charles Russell, ekzemple, kvankam Irlandano, fariĝis la ĉefjuĝisto de Anglujo. Nia granda, bona kaj memorinda patrioto O'Connell, naskiĝis ne tre malproksime de Blarneja, kaj sendube kisis la ŝtonon Almenaŭ tion li neniam kontraŭdiris. Duko de Wellington (ankaŭ Irlandano), laŭ



LA BLARNEJA KASTELO.

nedubebla historio vizitis la Blarnejan Kastelon, kaj kisis la ŝtonon (la 11^{an} de Januaro 1809) kaj el tio (kiso Wellingtona) ni vidas la plej nedubeblan pruvon de la mirindaj efektoj de tiu ĉi talismano. Li nature estis viro malklera, sensprita; tamen kisinte la ŝtonon, li elfariĝis granda generalo, kaj saĝa, lerta politikisto. Ĉu Wellington poste ĉiam memoris kun respekto kaj dankemeco la ŝtonon kaj Kastelon Blarnejan, kiel la fundamenton de la sukceso, kiu alfluegis al li dum la tuta posta vivo? Mi devas malĝoje diri, ke ne. Kontraŭe li senhonte kaj mensoge maljesis, ke li iam kisis la ŝtonon.

Pri aliaj ŝtonoj mi aŭdis, sed ili seninteresiĝas kiam mi pripensas la Blarnejan Ŝtonon. Mi aŭdis pri la granda ŝtonego Gibraltar, pri la muzika ŝtono Memnon, kiu ĉiun matenon salutadis la levigantan sunon, pri la « Ŝtono de la Sorto » kiu kuŝas en la Westminster'a katedralo (London), kaj sur kiun la trompigemaj sed bonkoraj idoj de Anglujo kredas, ke Jakobo iam ripozigis sian laciĝintan kapon. Mi aŭdis pri la ŝtono de filozofoj (Lapis philosophorum). Mi legis en « Tra la Mondo » belege verkitan artikolon

pri la Rök-Ŝtono — sed la Blarneja Ŝtono estas sendube la plej interesa el ĉiuj. Se volos la legantaro mi poste rakontos ĝian historion, kiu eble estus interesa speciale por la antikvumuloj.

Kiam la Esperanta kongreso okazos en Irlando mi esperas, ke la tuta kongresanaro vizitos la Blarnejan Kastelon, kaj kisas la ŝtonon. Tiam la Esperanta elokventeco jam Blarnejigita ĉie elbuŝiĝos, kaj rapidigos tra la mondo, la triumfon de la Zamenhofa lingvo.

DILLIG.



LA DANCO DE L' GEFIANĈIĜO.

En 1501, en Bresse'a lando sur la placo de l' vilaĝo Brou (Bru) okazis la danco de la Paskaj ovoĵoj. Oni estis disĵetinta ovoĵojn sur la pargeton de l' spaco fermita por la balo. Laŭ la kutimo, belulino kaj ŝia amanto, kiuj sukcesis danci ĉiujn paŝojn de la bureo (1) ne rompante unu solan ovon estis plenrajte gefianĉigitaj.

Tiun jaron Margerito de Aŭstrujo eniris la vilaĝon Brou'on kun sia sekvantaro. Ŝi sin apogis sur la brako de duko Filiberto de Savojo. La juna princino volis danci kun sia bela akompananto. La ovoĵoj restis tute sendifektaj. La homamaso aplaudis; la vangoj de Margerito de Aŭstrujo purpurigis;

ŝia koro batadis. Filiberto de Savojo estis ĉe ŝiaj genuoj ka langore (2) petis ŝin pri ĉiuj rajtoj, kiujn donas la malnova kutimo de l' Bresse'a lando. Konsente la juna princino allasis sian blankan manon al la lipoj de sia kundancinto.....

Ĉe la Paskotago, en Brou kaj ĝia ĉirkaŭaĵo okazos ankoraŭ la danco de l' gefianĉiĝo. Ĝi komenciĝas per rideto kaj finiĝas per kiso. Bonega kaj poeteca ovaĵo! Kiu do certigas, ke neeble estas fari ovaĵojn ne rompante ovoĵojn?

Laŭ la « Petite République »,
Esp. JOHANINO FLOURENS.



(1) fr.: bourrée. — ang.: boree.

(2) lat.: langor; ang.: languor; il.: languore; fr.: langueur.

El « Afrikaj Leteroj »

Laŭ H. SIENKIEWICZ (Polujo).

La enigma Sfinkso mirigas pli ol ĝi admirigas. Ĝia ĉefa beleco kuŝas en la situacio kaj en la lum-kaj ombroludoj, kies sidejo ĝi estas ĉu nokte, ĉu tage. Inter la multaj paĝoj, kiujn ĝi naskis, ni plezure liveras la jenajn al niaj legantoj, dank' al la afableco de nia distinginda samideanino, S^{ino} Hulanicka. Oni komparos ilin interese kun la linioj dediĉitaj de Prus al Sfinkso, en « La Faraono ».

Ne ekzistas Eŭropano, kiu ĉeestante Kairon, ne vizitas kelkafoje Piramidojn kaj Sfinkson, sed ne multe el ili faras tiun ĉi viziton nokte.

Mi ankaŭ ne estus pensinta pri tio, se unu mia konatulo ne estus rakontinta al mi, pri la impresoj farata de Sfinkso je la lunlumo. Mi decidis, dungi en Kairo veturilon, kaj veturi.

Aliro facila, sed mi devis atendi kelkajn tagojn, ĉar la noktoj fariĝis nubaj. Fine, alvenis unu, se ne tute luma, sed pli luma ol aliaj; do plu ne atendante, mi ekveturis kun tri kolegoj, antaŭ noktomezo, de placo Ezbeko.

La sama vojo tra la ekdormintaj urbstratoj, la Nila ponto kaj la longaj aleoj prezentas nokte strangan vidaĵon. La ĉefa impresoj, kiun oni havas en Oriento, traite la strat-ojn, pontojn kaj placojn tage, estas impresoj de moviĝego kaj bruego. La urboj ŝajnas plenigitaj kaj bruegaj kiel nenie.

Tra tiu sama Nila ponto kaj la aleoj oni malfacile trairas. Je ambaŭ flankoj trapaŝiĝas Araboj, Beduinoj, Hebreoj, Koptoj, Negroj, Grekoj kaj Angloj; meze iradas aroj da kameloj, veturiloj jungitaj je bovoj, « Paŝaj » kaleŝoj kun « spaisoj » kurantaj antaŭ la ĉevaloj. Vi vidas ĉiujn haŭtkolorojn kaj aŭdas ĉiujn lingvojn. Estas tiaj movado kaj krioj, ke oni perdas la kapon! Sub laŭvojaj akacioj kaj palmoj multo da vendejoj, koloraj teksaĵoj, bakaliaĵoj, sukeraj kanoj, post kameloj, post aroj da azenoj; meze de tio, amaso da kriegantaj gvidistoj. La tuta vidaĵo, en maldolĉa lumo aŭ nigraj ombroj, sen ia komuna koloreco, sed kun koloroj ne videblaj alie, certegaj kaj tiel treege fortaj, ke, post iom da tempo, ĝi lacigas la okulojn de Nordano, kaj fariĝas preskaŭ netolerebla.

Nokte, silento kaj soleco. La mondo, de Nila vaporo kovrita, estas necerta kaj pala. Kun la ideo de Oriento tiel ligiĝas eco de klaregeco kaj lumego, ke oni mire sin demandas, ĉu tiu vapora kaj nebula rivero estas Nilo? la urbo — Kairo? Eble somere, alie, pli Oriente prezentigas la noktojn, vintre ĝi forportas nin sub norda ĉielo kaj mirigas. Sed nia imago, lacigita per la lumegeco de tagaj impresoj, ripozas tiam bonege.

La vojo el Kairo ĝis Piramidoj daŭras pli ol unu horo. Iam oni vojaĝadis pli longe, tra pentrindaj arabaj kaj beduinaj vilaĝetoj, proksime la rivero kaj ne



LA SFINKSO.

proksime, tra palmaj arbaretoj kaj riĉaj kampoj. Nun estas desegnita de la inĝenieroj nevenkebla rekta linio, kiu mal-longigas la vojon, sed pasas for ĉio vidindega. Eĉ tage la vilaĝetoj restas malantaŭ la videbla limo; nokte, oni nenion vidas, krom trunkoj de laŭvojaj akacioj, lumigitaj per la veturilaj lumigiloj. Proksime Piramidoj finiĝas lando kulturita, finiĝas kiel preskaŭ en la tuta Egiptujo sen ia nuanco. Post la grena verdaĵo, kiu nokte ŝajnas nigra — komenciĝas subite granda, senkreskaj, pli luma spaco — jen sabloj — dezerto; sur ĝi oni vidas la triangulajn siluetojn de Piramidoj.

Ni lasas nian lokon kaj alveturas al Mena. Ĝi estas angla hotelo, kie oni kunigis la antikvegiptujan kaj araban

ornamaron kun nuntempa komforto. Tie ĉi loĝas malsanuloj por enspiradi l' aeron de l' dezerto, aŭ tiuj, al kiuj estas necesa, por trinkadi matenan kafon, la vidaĵo de Piramidoj. Dek du horoj jam de longe eksonis, kiam nia veturilo haltas antaŭ la pordego. En Mena ĉio dormas. Ni vekas la pordiston hotelan, loĝantan apud la pordegon, sed la dormetanta Beduino ne tro komprenas, kion ni volas, kaj, post mallonga parolado kun nia veturigisto, reiras dormi.

Ni iras solaj, ĉar la Piramidoj estas vidataj, kaj la vojo facile trovebla. La luno jam aperis, sed kaŝas ĝin larĝa nubrubando. Ĝi tamen ne estas gravedaj nuboj, enhavantaj, laŭ vortoj de Shakespeare (Ŝekspir): « ujojn plenajn je akvo, pretajn ĉi-momente disiĝi ». Ĝi estas peco de lertaj nubetoj, kiu tage similas amaseton da ŝafoj paŝantaj en la alto; kaj, post la suna subiro, kiu rozigas ilian lanon, ili kuniĝas kaj prepariĝas al dormo super la tero. La briloj de la luno ne trairas ilin, sed lumigas ilin ekstere; la nokto do ne estas tro mal-luma — sed pli griza ol argenta.

Tamen oni iras ne facile. La Piramidoj, malproksime desegniĝantaj nigre, proksime ŝajnas grizaj. Ni venas al Cheops'o. Proksime fantomas Chefren'. La okulo vidas kaj apartigas la objektojn; sed la formoj estas necertaj, la desegneroj intermiksiĝas, ŝanĝas kaj kuniĝas kun la ĉirkaŭaĵo. Ĉio estas palegriza — la sablo de l' dezerto, la piramidaj ŝtonoj, la amasoj da disrompaĵoj; ĉio estas fantoma, dormanta, kvazaŭ senpeza.

Silento regas, kiun oni povas nomi tombeja ĉar ni ja estas meze de tombejoj. Ĉirkaŭe, la mondo morta. Kaj ni parolas mallaiute, kaj — malmulte. Suprenirinte iom la Cheops' Piramidon, ni sidiĝas silente, kaj ĉiu penas sciigi pri sia propra impresoj. Ĉio, kio nin ĉirkaŭas, estas tiel aliege ol tio, kion ni en la vivo vidas, tiel stranga, kaj majesta en sia grandeco — meze de l' nokto kaj silento, ke vere oni nur havas diversajn sentojn, ĉar la penso timigita ŝajnas tiel malforta — kiel malforta estas homo antaŭ tiuj ĉi grandeguloj.

El ŝonĝoj vekas nin, alvenanta el la malproksimo kaj mallumo, la plendema voĉo de ŝakalo. Tie ĉi estas multe da ili, kaj Angloj, loĝantaj en Mena, ofte sin kaŝas dum lunaj noktoj meze de Piramidoj, por da ĝi pereigi. Fine ni malsupreniras, por alproksimiĝi Sfinkson, ĉar tra la nuboj estas videble, ke baldaŭ la luno aperos sur pura ĉielo.

Ni preterpasas amaseton el pli malgrandaj Piramidoj. Ĝi estas tombejoj de tiuj Faraonoj, kiuj dum mallonga tempo ne povis konstruigi egale grandegajn maŭzoleojn, kiel: Cheops' Chefren', Menes'. El tiuj pli malgrandaj oni, dum jarcentoj, elprenadis ŝtonojn, pro tio ili estas preskaŭ tute ruinigitaj, kaj nokte ŝajnas kvazaŭ senformaj amasoj el disrompaĵoj.

Ĉie disĵetitaj ŝtonoj — pli kaj malpli grandaj, la tero kovrita per ruinaĵoj, fosaĵoj en sablo, la vojo necerta kaj laciga. Sed jen sur nokta ĉielo io desegniĝas antaŭ ni, kvazaŭ grandega makulo — ĝi estas Sfinkso.

Ni alproksimiĝas. Sfinkso estas malpli griza ol Piramidoj. Ĝia grandega kapo, elfarita el ruĝa ŝtono, estas tute nigra, kvazaŭ densiganta la nokton. La vizaĝ'eroj estas nevideblaj, la korpo ankaŭ, ĉar ĝi estas malsupre, pli malsupre ol la dezerto. Oni jam elĵetis la sablon, kiu ĝin kovris, je ambaŭ flankoj, sed, ĉar ĉio estas samkolora en la mallumo, la okulo ne povas ĝin distingi — kaj nur la kapo elstaras super la dezerto, grandega kaj mistera.

Certe, Sfinkso faras pli grandan impreson ol la Piramidoj. La Piramidoj estas, malgraŭ ĉio, geometriaj formaĵoj. L' animo ne vivigas ilin, kaj ili havas ian matematikan sekecon. Sfinkso estas grandega estulo. Starante antaŭ ĝi, oni senvole supozas, ke en tiu morta silento, ĝi sonĝas kaj juĝadas pri io granda kaj mistera.

Fine la luno elruliĝis el nuboj sur pura ĉielo kaj tiam komenciĝis por mi unu el la plej belaj noktoj, kiujn mi vidis. La kapo de l' Sfinkso el nigra fariĝis malhelverda kiel malnova bronzo; la vizaĝo kovriĝis je homaj vizaĝeroj, vekigis kvazaŭ el dormo, kaj ekridis al la luno. Antaŭ niaj okuloj fariĝas sorĉoj; kreiĝis ia mistika ligilo inter la Sfinkso kaj la luno. Mi forgesas nuntempan mondon, kaj kredas vivi en la antikva Egiptujo. Jen Izido sur la ĉielo; jen la Sfinkso murmuranta ion al ŝi; jen el la Piramidoj alvenas blankaj hieroduloj; kaj komenciĝas iu preĝo sankta, kaj sekreta. Tio, kio por mi estis libra teorio, ŝanĝiĝas je tia efektiveco, ke ia stranga timo penetras mian animon. Sfinkso fariĝas tiel vivema, ke oni vane ripetas al si, ke tio nur estas luma iluzio. Oni ne povas deturni la okulojn de tiu vizaĝo, kiu tute alturnita al la luno ridetas

ĉiam. Mi poste vidis ĝin tage, sed je la sunlumo oni rimarkas hakajetojn faritajn de la tempo — nokte, en argenta lumo, ĝi estas tute vizaĝo homa, kiu moviĝetas, pensas, sentas.

Nun estas videblaj la forĵetitaj sabloj, kiuj kovradis la Sfinkso'n korpon, sed nokte tio faras l' impreson, kvazaŭ ĝi mem elĵetus ilin, kaj elleviĝis el tero, por saluti la lunon kaj paroladi kun ĝi pri tempoj tiel malnovaj, ke neniu, krom ili, ne vidis, ne memoras, ne enskribis.

Ĉar kion ĝi ne vidis? — tiu Sfinkso — ĝi, kies komenco estas mistera enigmo — ĝi, kiun Cheops' riparigis? Ĝi staras, kiam oni konstruas la Piramidojn, kaj eble Cheops' rifuĝis en ĝian ombron je l' suna varmego. Poste ĝi vidis Moison kaj Kambiz', Aleksandron kaj Ptolomeo, Cezaron kaj Mark' Antonion, Kleopatron kaj « Mater Dei' » n, fajron je bruliĝo Aleksandria kaj sovaĝan Amru', sanktan Ludvikon kaj Napoleon'. Ĝi ĉion vidis — kaj ĉiam dum noktoj ridetis al la luno. Ĉio forpasas — ĝi sola restas. Ĝi estas tiel antikva, ke oni ĝin preskaŭ ne atentis kiel verkon de homaj manoj — kaj senvole vidas en ĝia grandeco ion kosmikan, kvazaŭ ĝi estus kreita per io sama, kiel tiu luno, kun kiu ĝi paroladas dum lumaj noktoj.

Kaj tiel, ili ambaŭ rigardas sin reciproke en argenta lumo, meze de l' ekdorminta dezerto. Ĝiaj flavaj sabloj fariĝas nun helverdaj, apude briliĝas la Piramidoj, post ili, spaco malplena, sen fino. Inter la objektoj ekzistas harmonio aŭ malharmonio. Tie ĉi ĉio estas harmonia, grandega; mistero, soleco kaj grandaj tombejoj; kaj krom ili nenio — nenia diverseco de objektoj, nur ĉirkaŭe la dezerto plenigita je lumo, majesta kaj neesprimeble malgaja.

Sed, en tiu melankolio estas nenia sufero. Kontraŭe, ĝi estas granda kaj treege harmonia simfonio, de kiu, apartaj akordoj estas la Piramidoj, la Sfinkso, la luno kaj la dezerto. Ili prenas la homan animon kaj balancas ĝin, kiel por ĝin endormigi. Prave estas veni Egiptujon, unu fojon en la vivo, sin ensorĉi per tia simfonio!

Trankvilo ĉirkaŭe. Nur la luno supreniras alten kaj alten. El la tero, varmigita tage per la sunaj radioj, vaporoj leviĝas kaj rampas super la dezerto, kvankam estas nenia vento. Ĝi dum unu momento kaŝis la Sfinkson, sed la luno tuj ĝin eltiris, la vaporo iris plue, kaj ĉirkaŭis la Piramidon Menes', kiu, mi ne scias kial, el argenta fariĝis subite roza, poste estingiĝis, kaj post rehavis sian lunan koloron.

La tagiĝo estis ankoraŭ ne proksima, ĉar nek luno, nek steloj paliĝis; sed la nokto forflugis. En beduinaj tendoj starantaj meze de l' dezerto, laŭtiĝis krio de koko; post la unua laŭtiĝis dua, tria,.... deka; subite ni aŭdis kraketon de sablo kaj iujn voĉojn: eble iu alproksimiĝas. Post momento, sur la sabla altajeto malantaŭe la Sfinkso desegniĝis kamela silueto, kaj je ĝia fleksita kolo du beduinoj vestitaj per blankaj vestaĵoj.

Tiu biblia kamelo, kaj du homoj, similaj al noktaj fantomoj, estis kvazaŭ la lasta akordo de tiu Orienta nokturo...

Esperantigis:
S. HULANICKA.



NIA KONKURSO PRI HISTORIO SEN PAROLOJ. — I^a PREMIO.

I.

Varmega l' aero, agrabla la maro
Instigis Dikulon sin bani.
Volonte li fumus; jen estas cigaro,
Sed kiel sen fajro ĝin fumi?

II.

Helpema Dandeto, ĉi tion vidinte,
Proponas liveri la fajron.
Flekseblan tabulon Dikul' ekkaptinte
Sin levas, prezentas cigaron.

III.

Ĉi bone prosperis; en akvon refalas
Dikulo kontenta kaj danka.
Samtempe Dandeto tre alten eksaltas
Kriante per voĉo tre rauka.

MALNOVULO (Francujo).



Fot. Ramilyaona.

MALGAŜAJ ESPERANTISTOJ. LA GRUPO « VERDA STELO ».

De maldestre dekstren: S^{ro} Razafitrimo, kas., en uniformo de enlanda registaro; D^{ro} Randrianasolo, prez.; K^{no} Fortin honora prez.; S^{ro} Rasamsely, vic. prez.; S^{ro} Razafindrakoto, kunsidanto; S^{ro} Razafimahazo, sekr.



Novaj gazetoj. — « *Espero* », internacia revuo de la kultura unuiĝo de popoloj. Oficiala organo de la kleriga ligo « *Vjestnik Znania* ». Ĝi estas senpaga aldono al la rusa samnoma gazeto « *Vjestnik Znania* » kaj celas propagandi Esperanton ĉe siaj multenombraj legantoj per artikoloj en ambaŭ lingvoj kaj instrua fako. Ni certe havos okazon reparoli pri tiu promesplena gazeto, kiu anoncas la kunlaboradon de D^{ro} Zamenhof, kaj kun ĝoja fiereco sciigas, ke « eĉ se *Espero* tute ne havos abonantojn, ĝi tamen povos eliradi », ĉar ĝi apogas sin sur riĉa nacia ĵurnalo. Ni gratulas nian kunfraton pro tiuj favoraj kondiĉoj, kaj pro la unua numero.

Abono 10 fr. (4 sm.) ĉe « *Vjestnik Znania* » St Peterburgo, Nevskij 147.

La dua N^o de « *Voĉo de Kuracistoj* » aperis pliampleksigita. Ĝi enhavas la programon de interesa internacia enketo pri la *Sekreto profesia de kuracistoj*. Kiel ni diris en nia lasta n^o, ŝajnas ke ĉiuj kuracistoj esperantistaj devas sin interesi al tiu gazeto, ĝermo — se ĝi estas subtenata — de grava estonta gazeto, do de valora apogo por Esperanto. Mi multe konsilas abonon (1 Sm.) al niaj kuracistoj-abonintoj; ili almenaŭ petu senpagan specimenon rekomendante sin de ni, kaj poste konigu la gazeton al siaj amikoj, konatuloj, lernantoj. Ĉe D^{ro} Stephan Mikolajski, Lwów, strato Sniadeckich 6, Galicio-Aŭstrio.

« *Rumena Gazeto Esperantista* », aperas en Galatz, (3 fr., 1,20 Sm. jare). Ĝi alportis bonegajn sciigojn pri la esperantista movado en Rumenujo.

Ni citu ankaŭ « *Meksika Revuo* », kiu konigis sin per 6-7^a n^o. Al ĉiuj niajn plej korajn dezirojn.

Propagando. — *Dizionario Italiano-Esperanto* de G. Meazzini. Tiu volumo certe helpas multe la propagandon ankoraŭ malrapidan en Italujo. La vortaro enhavas nomaron de geografiaj nomoj, el kiuj kelkaj ne estas tradukitaj laŭ la naciaj esprimoj; ekz.: Dresdeno anstataŭ Dresden'o; Bretonujo anstataŭ Britujo ĝenerale uzataj.... Mi opinias, ke por eviti tiajn nekorektaĵojn, estus *absolote necese*, ke la aŭtoroj sendu la presprovaĵojn de ĉiuj lernolibroj (gramatikoj aŭ vortaroj)

al la Lingva Komitato, por antaŭta ekzameno.

Krom tiu detalo, la volumo ŝajnis al mi tre korekta, kaj ĝi estas zorge kaj tre legeble presita. Ĝi indigos la nomon, jam tiel favore konatan de nia fervora amiko. L. 2,50 (1 Sm.) ĉe Raffaello Giusti, Livorno.

Tulo kaj Ŝlosilo por Bohemoj, je la kutima prezo: 5 kaj 10 c. (2 kaj 4 Sd.) ĉe « Internacia Propagandejo esperantista » Merton Abbey, London, S. W. « *La Edukacio'n. La Edukado* », « *Zajmy Vselidske* », « *Scuola e Vita* », enhavas esperantistajn fakojn.

Libro de l' Humorajo, de Paul de Lengyel nia malnova propagandisto, estas kolekto el ŝercaj rakontoj, kun multaj ilustraĵoj, verkita en la plej korekta kaj bona Zamenhofa lingvo. Ĝi aperas en la kolekto de « *La Revuo* ». 2 fr. 50 ĉe Hachette kaj Kio.

Korespondeto.

Roanne (Loire — Francujo). Max Bousquet, baldaŭ kvarjaraĝa, disdonos dum 15 monatoj (ĝis jul. 190) inkl.) portretojn de si mem, grupojn el gelernantoj pri Esp. de sia patro, poŝtk. il., k. t. p., al ĉiuj geamikoj de la mondo, eĉ francaj, kiuj sendos al li ion agrablan (gaz. aŭ ĵurnl. il. bild., fotojn, natur. aŭ art. kuriozaĵojn, k. t. p.) kun kelkaj tre legeblaj vortoj.

S^{ro} Romein, Utrecht. — La n^oj estas regule senditaj al S^{ro} Valenton laŭ la ordonoj de la mendinto. Ni povos fari la adresŝanĝon nur se vi sendos la necesan sumeton.

S^{ro} G. Claybrooke, Los Angeles. — Via abono finiĝas kun la juna numero.

La Teknikaj vortaroj. Pro Marcel Finot, nia distinginda scienca kunlaboranto, partoprenos en la laboroj de « Internacia Scienca Oficejo ».

S^{ro} J. Olivier, Velletridon. — Ni ricevis vian mandaton por anonco, sed ne la apartan tekston.

S^{ro} J. A. Stynen, Anvers. — Via ideo, tre bona, estas jam proponita kaj aplikita.

Fino Mabel V. Stall, P. O. Box 247, Waynesville, North Carolina, U. S. A., deziras korespondi.

Ne la grupo de Valenciennes, sed tiu de Vesoul preparas prezentadon de la ĉarma komedio « *Duonsurda* ». Ĝi okazos en la teatro de Vesoul, kun la permeso de la aŭtorino.

S^{roj} Delas kaj Potier. Oni sciigas al mi, ke vi ricevos *Japana Esperantisto* de la Januara n^o.

Brazila Ligo. — Miaj antaŭaj aludoj al la prireforma afero jam respondis al via demando. Ni iru kuraĝe antaŭen.

Manĝurio. — Nia bonega kunlaboranto Kazi Girej daŭrigas sian fervoran propagandon en Harbin, kie li faris paroladon ĉe la teatro, februarofine.

Ni altiregas la atenton de niaj sportamaj legantoj pri alloga projekto de nia samideano Henri de Coppet, kiu deziras organizi bicikledan karavanon de Stuttgart al Dresden. La vojaĝo daŭrus 6-7 tagojn, tra Nurnberg, Bayreuth, Karlsbad kaj la Saksa Svisujo. Oni sin turnu senpere al S^{ro} de Coppet, 179 Bd Pereire, Paris.

GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

GELLE FRÈRES

Parfumistoj **PARIS**

La firmo korespondas Esperante.

Internacia Scienca Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Scienca Asocio Esperantista

Administracio kaj Redakcio:

SCIENCA OFICEJO, 8, RUE BOVY-LYSBERG,

Ĝenevo-Svislando.

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono: 2.75 Sm. (2 spesimiloj 75 spesdekoj).

Unu numero: 25 spesdekoj

Oni abonas ĉe la *Scienca Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & Cie* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Gnusti*, Livorno (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Polujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Høst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo).



LIQVORO DE L'INTERLIGO

(FORTIGA KAJ DIGESTIGA)

La analizo provas la bonajn kvalitojn de tiu-ĉi higiena likvoro Ĝi meritas de la konfidon kaj la preferon de la Popoloj

TROYES-FRANCE L. GUYOU & J. FÈVRE



MARKO LIVERITA.

CHABLIS QUINA

EL MALNOVA ENLANDA VINO.

Kiel ĉiuj preparajoj kun kinkono, la **CHABLIS QUINA**, deponas maljunigante, sed-tamen ĝi konservas tute siajn eminentajn higienajn proprecojn

LIVERITA LAŬ LA LEĜO. **L. GUYOU & J. FÈVRE**
TIU VINO NE ESTAS MEDIKAMENTO. TROYES



ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista Kongreso. Genèvo 1906

Prezo: FRANCUJE. — 11 f50 la kesto da 2 boteloj
Sen kosto pri transporto kaj impostoj.

ALIHANDE. — 4f ĉiu botelo prenita en S^t Etienne, impostoj kaj transporto plukaj.

Generala Tenejo por Francujo kaj Fremdujo:

J. B. Brunon-Chauvet
S^t Etienne (France).



LEGU :

UNUA ĈAPITRO DE MIAJ MEMORSKRIBOJ. — DUONSURDA.
Vidu la 4^{an} kovrilan pagon.

BONVOLU ATENTE LEGI :

Mi faras la adresŝanĝojn nur laŭ peto **akompanata de 50 cm.** Se oni ne plenuma tiun formalajon, ni daŭrigas la sendadon de la gazeto al la malnova adreso *je la riskoj de la abonanto.*

La grupoj bonvolu **zorge** konigi, al kiu oni devas sendi la gazeton, kaj konigi la ŝanĝojn de sekretario **plenumante la ĉi supran formalajon.** Se ne ili riskas perdojn, pro kiuj ni ne povas respondi.

La sendo de la gazeto estas **ĉiam zorge kontrolata**; do ni ne akceptas respondeco pro la numeroj perditaj de la poŝto, por kiuj estas necese resendi pagon (30 Sd. poŝtmarke).

Ni remorigas, ke la abonoj al « *Tra la Mondo* » komencas januare, aprile, julio, oktobre, kaj ke la gazeto aperas **la lastan tagon de ĉiu monato.**

Ni ne sendas senpagajn specimenojn. Ni sendas jaran enhavon ilustritan, kiu ebligas juĝi la intereson, variecon kaj internaciecon de la gazeto, kaj la valoron de ĝia kunlaborantaro.

ESPERANTAJ ORGANOJ.

Ĥho Esperantista. — Praktika kaj komerca. Ĉe S^{ro} Karl Steier, Plan-Ufer 41, Berlin S, Deutschland. Jare, 2 markoj (1 Sm.).

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu N^o afrankita 0f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France). (1,60 aŭ 2 Sm.).

Espero Pacifista. — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K^o, 79 Boulevard St-Germain, Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7. (2,80 Sm.).

Socia internacia Revuo. — Pritraktas ĉion, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. (2,40 Sm.). Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

La Verda Standardo. — Scienca kaj literatura. Monate 12 paĝoj. 4 fr. (1,60 Sm.) ĉe S^{ro} Marich Agoston, Budapest IX. Ŭllői-ut 59. IV, 8.

Ĉasopis Ĉeských Esperantistu. — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. (1,50 Sm.) 3k. por Aŭstrio. Adm. kaj Red.: Praha, Bohemujo.

L'Espérantiste. — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriĵoj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. (1,40 Sm.). Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare (1,50 Sm.); aparta N^o: 35 cent. (14 Sd.)

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, kun ilustraĵoj. Jar. 4 fr. (1,60 Sm.). — N^o 1a, 3 ĉome, Jurakĉo, Kozimacik, Tokio.

La Lumo. — 5 fr. (2 Sm.) Ĉe Ivan Nenkov, strato sv. gorska, n^o 2299 V. Tirnovo, Bulgarujo.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 5 fr. (2 Sm.). Warszawa, Hoza, N^o 40, m. 8.

Ruslanda Esperantisto. — Ĉiunonata organo de la S-to «Espero»; — Jara abono 8 fr.: (3,20 Sm.) Ruslando, *St Peterburgo*, Nikolajevskaja, 33.

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. (1,20 Sm.) Administracio kaj redakcio: Avellanar, 11, presejo — Valencia (Espana).

Svisa Espero. — France kaj Esperante — 2 fr. (0,80 Sm.). Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEM AJ ORGANOJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. (4 Sm.). 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

De Lusthof. — Ĉiunonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj. (0,80 Sm.). Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belglando.

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro}: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literaturo kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

UNUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Kompletaj kolektoj. 6,40 Sm.

Restas ankoraŭ tre malmulte da ili akireblaj nur senpere. Kolektoj nekompletaj:

1^e mankas la Aprila N^o. 3,20 Sm.

Restas ankoraŭ 2, akireblaj nur senpere.

2^e mankas la Aprila kaj Maja N^oj. 2,40 Sm.

DUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Sen specialaj kondiĉoj. 3,20 Sm.

UNUA ĈAPITRO DE MIAJ MEMORSKRIBOJ.

Ĉarma rakonto de
FRANÇOIS COPPÉE,
Ano de la Franca Akademio,
Tradukita en Esperanto de A. Montrosier.
75 c. — 30 Sd, ĉe « Tra la Mondo ».

DUONSURDA.

Originala duakta komedio de
JOHANINO FLOURENS,
30 c. — 12 Sd, ĉe « Tra la Mondo ».

Rekomendataj firmoj.

ESPERANTA RESTORACIO ANONCAGENTO. 80, Rue Mazarine, PARIS 6^e.
Bona familia kuirado je moderaj prezoj. La mastro parolas kaj instruas Esperanton.
C. A. G. BROWNE, 53 kaj 54, Wych Street, Strand, W. C. London, Anglujo, deziras korespondi pri anoncoj kaj reklamoj. Varbas anoncojn por « Tra la Mondo ».

LA PLUS LOGIQUE des Méthodes appliquée à LA PLUS SIMPLE des langues suivant LES PLUS MODERNES des principes d'enseignement des langues.

Méthode Palmer

Livre de 100 pages: fr. 1.25 (0,50 Sm.). Franco: Belgique, fr. 1.35. — Etranger, fr. 1,50
VERVIERS, Place Verte, 20.

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta la 15-an de ĉiu monato

48 paĝoj (13 × 20 cm.), nur en Esperanto.

LITERATURA ALDONO: 16 paĝoj.

JARA ABONO: 7 fr. 50 (3 sm.)

ADMINISTRACIO:

Preso Esperantista Societo,
33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj.

Jara abono: 2 fr. 50 (1 Sm.).

Administracio: Preso Esperantista Societo,
33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Fandejo por presiloj DEBERNY kaj K^o

58, Rue d'Hauteville — PARIS

Kompleta instalo de presejoj. Granda elekto pri skriblitoj, tekstoj kaj ĉiuspecaj fantazioj. Preslitoj kun supersignoj specialaj por ĉiuj fremdaj lingvoj kaj ESPERANTO. La fandejo DEBERNY kaj K^o sendos, laŭ peto, presprovaĵojn el ĉiuj siaj serioj en kiuj ĝi posedas la specialajn supersignojn por ESPERANTO.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.
A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.

Germana Esperantisto

Oficiala organo de la Germana Esperantista Societo

kun literatura aldono.

« LIBERAJ HOROJ »

aperas ĉiunonate en lingvoj Esperanta kaj Germana kaj celas disvastigi la Esperantan movadon en ĉiuj germanlingvaj landoj.

Jara abonprezo Mk. 3,00 (1,50 Sm.)

Redakcio kaj administracio:
ESPERANTO VERLAG MOLLER & BOREL,
Berlin, S. Prinzenstr. 95.

PROPAGANDAJ ORGANOJ.

The American Esperanto Journal. — Jare 2 Sm., 5 fr. Boulevard Station, Boston, Mass. (U.S.A.).

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo: 3 fr. (1,20 Sm.). Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belga Sonorilo. — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. (2,40 Sm.) jare. 53, Rue de Ten Bosch, Bruxelles. La abono komencas nepre la 1^{an} de Septembro.

The British Esperantist. — Jare 4 fr. — Ĉe B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

Brazila Revuo Esperantista. — Portugale kaj Esperante. 6 fr. (2,40 Sm.). — Ĉela administracio, Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro.



NINE RESPONDAS PRO LA GAZETOJ MENDITAJ PER NI.